

Monato

INT

MAGAZINO SENDEPENDA

Problemoj en PERUO

Funebra muziko
resonas

anoncetoj

Ĉu vi havas modemon? FEL serĉas kelkajn personojn, prefere en Belgio aŭ ĉirkaŭaĵo, kiuj posedas modemon (kaj komputilon!) kaj pretas fari kelkajn mallongajn testojn. Skribu al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.

Filio de **Pola Esperanto-Asocio** en Olsztyn organizas en la tagoj 25-27an de junio 1993j. Esperantan semajnfino kadre de Jubileaj Tagoj de Olsztyn, titolitaj „Ni serĉas kontaktojn kun la unuiganta Eŭropo”. La programo konsistas el: vizitado de la urbo, interkona vespero, prelegoj kaj konkursoj. Loĝado ĉe esperantistoj aŭ en hoteloj (laŭ deziro kaj ebleco de la lokaj esperantistoj). Kore akceptataj estas esperantistoj povantaj prezenti interesan prelegon. Detalajn informojn donas kaj aliĝilojn akceptas (ĝis la 1-a de majo de 1993j.): Esperanto-Filio, pk.420, 10-900 Olsztyn 2, Pollando. Venu al Olsztyn, la ĉefurbo de regiono Varmio kaj Mazurio, konata pro la belaj lagoj kaj arbaroj.

Ni havas sepjaran filinon kaj kvinjaran filon kaj serĉas kontakton al samtipa familio (ne nepre tutesperantista) en suda Anglio. Bonvolu skribi al familio Klag, Rudolfnergasse 8/11, A-1190 Wien.

ICEM-ESPERANTO (Kooperativa Instituto de la Moderna Lernejo Freinet-pedagogio) invitas vin partopreni en sia renkonto en Pardubice, Ĉeĥio, de la 14a ĝis la 23a de julio 1993. Petu pliajn informojn kaj aliĝilon: interesuloj de eksocialistaj landoj al Jarmila Ryznarová, na okrouhliku 953/21, 53003 Pardubice, Ĉeĥio; aliaj landoj al Daniel David, 44, rue de Lens, F-59190 Hazebrouck, Francio.


Partoprenu Esperanto-Somerlernejon en Anglio inter la 7a kaj 13a de aŭgusto 1993! Detaloj haveblas de: The Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Britio, ST12 9DG.

Lernolibro de fiziko en Esperanto estas verkata. Kunlaborantoj bonvenaj. Inf. Matti Lahtinen, Sippolankartano F3, SF-62375 Ylihärmä, Finnlando.

La privata komerc-turisma firmao MARRAN (Moskvo, Ruslando) interesiĝas pri negoco de diversaj konsumvaroj el via lando. Oni pretas pagi per dolaroj aŭ aranĝi reciproke profitan barterkomercon, komunan produktadon. **Plej gravas kvalito, nivelo de prezoj kaj rapideco de liveraĵoj.** Oni havas eblecon loĝigi grupojn da turistoj en unuaklasaj aŭ en apudurbaj pli malmultekostaj hoteloj kaj garantias vizitojn al ĉiuj vidindaĵoj kun gvidistoj esperante kaj en iu nacia lingvo parolantaj; do temas ne nur pri esperantistoj. Demandoj kaj proponoj estas bonvenaj laŭ nia tel/fax (007) (095) 928-8049 Maran Stepanov (Esperante, angle, ruse).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 40 belgaj frankoj* (BEF) por unu linio (minimуме 240 BEF*). Sama anonceto kvinfoje: triobla tarifo. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

*Por Eŭropa Komunumo + 19,5 % AVI.




Tiuj ĉi kaj multaj aliaj belaspektaj brakhorloĝoj estas haveblaj ĉe FEL aŭ rekte ĉe la importisto, Flory Witdoeck, Witte Nonnenstraat 9A, B-8400 Oostende. Prezo de la dekstra horloĝo 1700 BEF, de la maldekstra 1267 BEF (ambaŭ inkluzive imposton sed ekskluzive afrankon).

Ĉu vi ŝatas nian revuon?

Ni ankaŭ povas presi vian revuon!

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

LAGAZETO



mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVNUMERON ĈE:
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCIO

ESPERANTO-KONFERENCO
EN HUNGARIO
KONDOROS

17-24 julio 1993



TEMO
Kial paroli Esperanton?

PROGRAMO

*prelegoj, debatoj, kursoj,
Osiek-premio, simpozioj,
 teatraĵoj, distroj, libroservo*

24-27 julio 1993
tri tagoj en Budapeŝto

Informoj, aliĝoj:
Eric Laubacher
1, rue des Vosges
F-78180
Montigny-le-Bretonneux
Francio
tel.: (1) 30 96 67 91


Monato

internacia magazino sendependa por politiko, ekonomio kaj kulturo

monata revuo en la internacia lingvo Esperanto □ legantoj en 75 landoj □ fondinto: Stefan Maul □ 14a jarkolekto □ aperas principe la 1an de ĉiu monato □ abontarifo varias laŭlande; petu ĝin de la eldonejo ■ **eldonejo:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono +32 3 234 34 00, telekopiilo: +32 3 233 54 33; poŝtĉekkonto Bruselo n-ro 000-0265338-43 nome de Vlaamse Esperantobond, Antwerpen □ valida anonctarifo: n-ro 6 □ kompostita kaj presita en la eldonejo □ por adresŝanĝoj nepre menciu la kodon kiu troviĝas dekstre sur la adreslipo ■ **redaktoroj:** William Auld, Gerrit Berveling, Tim Carr, Mark Fettes, Marco Gazzetta, Evgeni Georgiev, Paul Gubbins, Andy E. Künzli, Girvan MacKay, Stefan Maul, Seán Osborne, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert, Krys Ungar, Guido van Damme, Jean-Pierre VandenDaele □ 150 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj ■ aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj) □ represo kaj traduko el MONATO nur kun indiko de la fonto □ kopi-rajto ĉe la eldonejo □ ne sendu registritajn leterojn □ ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj; mendu ĝin pagante 20 NLG al UEA, konto NO-RA-F □ *verantw. uitgever:* Paul Peeraerts, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen □ la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.



La plej grava kaj eble ankaŭ la plej peza tasko de finredaktoro de sendependa internacia revuo estas ekvilibrigi la internaciecon kaj juĝi la internacian gravecon de naciaj raportoj. Ĉu iu okazintaĵo en iu lando estas sufiĉe grava por interesigi internacian publikon? Ĉu sufiĉas la vasteco de la reprezentitaj landoj. Versajne ne eblas en ununura numero prezenti tiun mond-



vastan skalon. Tamen vi ankaŭ en tiu ĉi numero trovos raportojn el ĉiuj anguloj de nia terглоbo.

Samon ni povas diri pri la rubrikaj temoj: Ĉu la scienca rubriko donas bonan bildon de la nuntempa scienca evoluo? Ĉu „moderna vivo” tuŝas ĉiujn aspektojn de la nuntempa monda socio? Kaj ĉu ĝi atingas sufiĉe altan nivelon? Honestan bildon ricevos ni nur post jardekoj... Eble MONATO ankoraŭ ne estas plenkreska. Tamen fidelaj legantoj certe jam povas prijuĝi ĉu la revuo plenumis kaj daŭre plenumas tiun taskon. Grava parto de tiu respondeco tamen ankaŭ dependas de niaj kontribuantoj. Sen ilia dediĉo la revuo lamas, kaj ĝi nur povas prezenti la kontribuojn kiujn ĝi ricevas.

La nuna numero prezentas en la politika kampo plej diversajn aspektojn de nunaj okazintaĵoj: demokratiajn elektojn kontraŭstaras perfortaj puĉoj; komunistoj konfrontiĝas kun nova ŝanco; naciecaj fortoj eniris la batalkampon kontraŭ ŝtatismaj fortoj. Dum tio okazas en la politika tereno, scienco serĉas fundon en la spaco. Ekonomio, pro la kolapso de malnovaj sistemoj kaj la sekva malstabiligo de aliaj, nepre bezonas novajn vojojn, novajn deirpunktojn.

Granda aganto kaj viktimo de tiuj perturbaĵoj – samtempe ankaŭ kaldronego en kiu bolas, laŭ ne-MONATA kuirrecepto, la supo de estonta mondo – estas eksa Sovetio. Kiel postvivos ĝia lingvo – la rusa – la eksperimentadon kiu nun okazas en la politika kaj ekonomia kampoj. Certe ĝi restas sufiĉe grava kaj meritas esti prezentata sur niaj lingvaj paĝoj. Inter ĉiuj perturboj malgrandaj popoloj klopodas sin vivteni. Ĉu ili sukcesos nur kiel... turisma kuriozaĵo?



Enhavo

Noticoj	4
El mia vidpunkto	5
Leteroj	6
Politiko	8
Medio	13
Scienco	14
Moderna vivo	16
Ekonomio	18
Lingvo	20
Turismo	22
Libroj	23
Novelo	24
Poezio	25
Eseo	26
Muziko	28
Kuirado	29
Humuro	30

Etnismaj problemoj

Pri „Etnismo, fundamenteroj, problemoj kaj perspektivoj” prelegos diversaj kontribuantoj dum seminario organizata de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL). La seminario okazos inter la 19a kaj 23a de julio 1993 en la ejoj de „Kultura Centro Esperantista” en La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu pliajn informojn ĉe IKEL, Im Römerfeld 44, D-W-5180 Eschweiler, Germanio.

Bahaa mondkongreso

Ke la misio de Baha'u'llah, la profeta fondinto de bahaismo, estis transformi la homaron al paca kaj justa unueca organismo kaj efektiviĝi la „bonon de la mondo kaj la feliĉon de la nacioj” – pri tio rekonfirmiĝis 27 000 bahaanoj el ĉ. 180 landoj dum la dua bahaa mondkongreso en Novjorko.

Tiu ĉi plej granda kunveno en la preskaŭ 150jara historio de bahaismo impresive pruvis la efektiviĝon de la instruoj de Baha'u'llah pri unueco kaj paco. La kvartaga programo de la kongreso, kunvokita por soleni la centan datrevenon de la forpaso de Baha'u'llah, revuis la historion de tiu ĉi plej juna mondreligio kaj la ampleksecan gamon da aktivecoj de ĝia plurmiliono mondkomunumo.

Bernhard WESTERHOFF

Ukraina ne plu deviga

Ministrejo pri klerigo de Krimea aŭtonoma respubliko (Ukrainio) forstrekis la ukrainan lingvon el la listo de devigaj temoj por mezlernejoj. Tiamaniere la rusaj ŝovinistoj denove akiris la lingvan situacion en la duoninsulo, kie laŭkonstitucie la ukraina, rusa kaj krime-tatara estas la oficialaj lingvoj. Tamen funkcias tie eĉ ne unu ukraina lernejo; pri la kvanto da ukrainaj klasoj la ministrejo rifuzis respondi.

Araneo

Irlanda finfine tolerata

Ĝis nun la uzo de la irlanda lingvo sur loknomplatoj, vojmontriloj, stratoj, ktp. estis malpermesita en Nord-Irlando, kie neniu lingvo, krom la angla, rajtis aperi sur publikaj indikiloj. Tamen, ekde 1993, nomoj en irlanda lingvo estas tolerataj. Fakte, stratnomoj kaj loknomoj jam de sufiĉe longa tempo estas videblaj en diversaj „naciismaj” (kutime katolikaj) distriktoj en Ulstero. La nova leĝo do nur rekonas tiun realaĵon.

GMA

Novaj telefonkodoj

La internacia unuiĝo pri telekomunikiloj liveris proprajn triciferajn landkodojn por Litovio, Latvio kaj Estonio. Telefonante al Litovio ekzemple ne plu necesas elekti kodon 7, kiu apartenis al Sovetio kaj la ligo aranĝis tra Moskvo. La nova internacia kodo por Litovio nun estas 370, por Latvio 371 kaj por Estonio 372. Nur por ligoj inter la baltaj landoj mem kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (KSS) kaj Pollando daŭre estas uzataj la malnovaj kodoj. Tiuj ĉi landoj estas kunligitaj inter si al alia telefonsistemo.

Laimius STRAŽNICKAS

Reciklitaj skribiloj

En la riĉaj landoj ekestis dum la lastaj jaroj iu bedaŭrinda fenomeno: malplenan globskribilon oni simple forĵetas. Por malpligrandigi la damaĝon al la naturo, jen kaj jen aperas skribiloj kiuj ne, aŭ nur parte, estas faritaj el plasto. Aĉetebblas jam skribiloj el maizo (post uzo birdoj ilin volonte manĝos) kaj nun el reciklita papero. Esperanto-Klubo el Nice (18, av. des Arènes, F-06000 Nice) eĉ proponas ilin nun kun esperantlingva surskribo.

pp

artwerpen 93


Kulturaj ĉefurboj

La 27an de marto Madrido transdonis sian epiteton „Kultura ĉefurbo de Eŭropo” al posteulo Antverpeno. Dum tuta jaro tiu ĉi urbo regalos siajn vizitantojn per aparte riĉa palestro da kulturaj aktivecoj. Ankaŭ esperantlingvaj programoj ne mankos (vd. ankaŭ en MONATO 1/93 p.16 kaj 3/93 p.32). Sed intertempe pluraj aliaj urboj jam preparas sin por transpreni la torĉon: Lisbono (1994), Luksemburgo (1995), Kopenhago (1996), Tesaloniko (1997), Stokholmo (1998) kaj Weimar (1999). Pri la elektotoj por 2000 kaj 2001 oni decidis en 1995.

pp

Novaj poŝtkodoj en Germanio

La 1an de julio ĉiuj poŝtkodoj en Germanio ŝanĝiĝos. La malnovajn kodojn, konsistantajn el D-W- kaj 4 ciferoj (iama okcidenta Germanio) aŭ D-O- kaj 4 ciferoj (iama GDR) oni anstataŭigos per kodo kiu konsistas el D- plus 5 ciferoj. Hamburgo ekzemple havos la kodojn D-20000 ĝis D-22999.



Eksterordinara projekto nun realiĝas: Makao, teritorio de 17 kvadrataj kilometroj, administrata de Portugalio, ĉe l' bordo de suda Ĉinio, ekhavas „trafikinsulon” en la maro. Kiel montras la fotomuntaĵo, temas pri flughaveno, kiun konstruas portugala kompanio Soares da Costa kaj germana kompanio Siemens (kiu disponigis la bildon) apud insuleto Tajpao, situanta antaŭ Makao (videbla fone). Oni ŝutos ne malpli ol 80 milionojn da kubaj metroj da sablo en la maron, por sur ĝi asfalti la bezonatan gigantan platformon por aviadiloj.

Kiel kapti milit-krimulojn?

Unuiĝinta Naciaro (UN) definitive decidis, instali novan milit-kriman tribunalon laŭ la modelo de 1' fama Nurnberga tribunalo post la 2a mondmilito, kiu persekutis kaj juĝis naziajn krimulojn. La 2a en la historio tia tribunalo (se neglekti similan kortumon en postmilita Japanio) juĝu pri militkrimoj faritaj en eksa Jugoslavio, pri kiuj ni nun jam de multaj monatoj legas ĉiutage en *Jurnalaj: seksperfortoj, masakroj, „etnaj purigoj” (= forpeloj), torturoj en koncentrejoj kaj aliaj barbaraĵoj.*

Nurnbergo: klara afero

Nurnbergo tamen ne estas vera modelo. Principe temas pri sama afero: internacia kortumo por kondamni plej malhumanajn krimojn. Sed la situacio estas tre diversaj. Tiam juĝis venkintoj super venkitoj en klara, supervidebla jurafero. Estis unu granda milito estigita de nazia Germanio kontraŭ preskaŭ ĉiuj aliaj landoj kaj krimoj kontraŭ difinitaj grupoj de homoj, kiel judoj. La plej multaj krimuloj post la germana kapitulaco estis en la manoj de 1' venkintoj, oni ne pene devis serĉi ilin. Krome postmilita Germanio fariĝis demokrata ŝtato, kiu povis eĉ post malfondo de 1' tribunalo en Nurnbergo daŭrigi persekutadon kaj juĝadon de pliaj militkrimuloj de malpli alta rango kaj ĵeti ilin en karcerojn, laŭ jurŝtataj proceduroj.

Kion alportis la tiama tribunalo? Ĝi povis mondpublike demonstri, kiaj monstroj estis la akuzitoj, kaj ĝi povis kondamni ilin al morto, aliajn ĵeti en specialan karceron. Tamen tiu tribunalo ne efikis mensoŝanĝon de ankoraŭ ekzistantaj fidelaj nazioj, kiuj sukcesis kaŝi sin. Ĝis niaj tagoj oni ankoraŭ trovas iujn el ili, kaj la lastatempe rekreskinta novnaziismo en Germanio montras, ke tia tribunalo ne kapablas ekstermi malhumanan ideologion.

Komplete alia situacio

Kiel ajn, la situacio rilate al eksa Jugoslavio estas komplete alia, kaj laŭ ĉirkonstancoj kaj laŭ tempo. Ne estas klarstruktura milito, sed diversaj militoj kaj bataloj de diversaj grupoj kaj trupoj, ĉepinte la serba armeo. Kvankam kutime oni parolas pri „intercivitana milito”, efektive ĝi ne estas milito inter civitanaj grupoj, sed grandparte inter geriloj gvidataj de iuj ofte memdifinitaj komandantoj. Krome: sendube la militon ekigis la serba armeo, sed krimojn faris ankaŭ neserbaj gerilanoj.

Ankaŭ la tempo estas tute alia. En Nurnbergo estis ne problemo, ke la tribunalo povis verdikti mortpunon (kaj tiel ne devis plenigi grandajn karcerojn). Hodiaŭ tia tribunalo fakte devus rezigni pri kondamnoj al morto, ĉar estas klara celo de UN aboli tutmonde mortpunon, kvankam en multaj ĝiaj membroj-ŝtatoj ĝi estas aplikata aŭ eĉ reenkondukata kiel ekzemple en Filipinoj. Do oni bezonas gigantajn malliberejojn por enkarcerigi ĉiujn kondamnitajn. En Germanio estis klare, ke la karceroj instaligis en la lando mem kaj ke germanoj devis pagi la koston. Sed kie staros la malliberejoj por la kondamnitaj el eksa Jugoslavio? Kiu pagos?

Tribunalo kun limigita mandato

La decido de UN estas direktita klare kontraŭ Serbio, la mandato por la tribunalo rigore limigita al koncernaj teritorioj en eksa Jugoslavio. La problemo de nuna UN ankaŭ estas, ke ĝi ne povas (ne volas) instali ĝeneralan militkriman tribunalon, ĉar en tiu okazo la prokuroroj povus kaj devus persekuti ankaŭ krimulojn en aliaj membroj-ŝtatoj. Tamen, eĉ se la ĉefa akuzito estus Serbio, oni devas demandi kiel la afero funkcii. Sendube - se entute


ĝi finiĝos - post la fino de 1' milito en eksa Jugoslavio jen ne estos venkintoj kaj venkitoj, kaj tutcerte Serbio ne estos okupata de iu venk-armeo kiel estis Germanio. Serbio restos suverena ŝtato. Ĉu ĝi, ekzemple, transdonos al la tribunalo sian gvidanton Miloseviĉ? Ridinda imago.

Vere komplikega situacio. Ĉu do eble la decido de UN por tia tribunalo havas nur la politikan celon, terurigi krimintojn kaj eviti estontajn krimojn? Ĉu tial la tribunalo estas nur minaco kaj neniam instaligigos? Se ĝi spite al ĉiuj komplikaĵoj ekfunkcios, kion ĝi povos efiki? Nu, ekzemple ĝi povus verdikti ankaŭ kontraŭ neĉeestanta akuzita Miloseviĉ; tiu do riskus esti enkarcerigata, kiam li forlasas Serbion, estus do kaptito en propra lando.

Kontentigi venĝosenton

Tamen, klare oni vidu unu problemon: Absolute ne eblos treni antaŭ la tribunalon ĉiujn milit-krimulojn, ĉiujn masakrintojn, ĉiujn seksperfortulojn, ĉar estus - sufiĉe terura ekkono - tro multaj. Do oni procesos nur kontraŭ la „alt-ranguloj”. Tamen eble tio sufiĉos por kontentigi la venĝosentojn de viktimoj. Kiam ili vidos, ke almenaŭ la „grandajn” krimulojn oni punas, eble ili pli facile pardonos al la „malgrandaj”. La homoj en eksa Jugoslavio post la milito devos, kiel ajn, iri la vojon al repaciĝo, al restarigo de bona najbareco. Espereble la tribunalo de UN estos kontribuo al tia dezirinda kaj necesa evoluo.

Stefan MAUL



Raportoj pri koncentrejoj kaj etna „purigado” instigas Unuiĝintan Naciaron al represalioj kontraŭ Serbio.

Aperritmo

Surprizo! La marta numero alvenis la unuan de marto. Mi gratulas Paul Peeraerts kaj la Flandran Esperantoligon. YAMASAKI Seikō, Japanio

Dekstriginta revuo

Laŭ mi la respondo de la redaktoro al la letero de Sabine Meyer (MONATO, 1993/2, p. 6 kaj 7) ne atestas pri serioza reago al la problemo, ĉar ja ne temas pri nombro, sed pri la naciisma kaj klerikalisma enhavo de kelkaj publikaĵoj. Mi rememorigas artikolojn de Marszałkowski kaj Książek (MONATO, 1992/7 p. 14, kaj 1992/10, p. 11). La unua elvokis lavangon da leteroj de poloj, sed ankaŭ de eksterlandanoj, kiuj indignis pri la ekstrema tendenco de la aŭtoro. La publikigo de ĉi-specaj artikoloj en esperantlingva – do nature progresema gazeto – elvokas konsternon. Sed ankoraŭ pli maltrankvilas, ke la redaktoro ne publikigis aliajn esencajn reagojn pri la problemaro... mi celas du artikolojn miajn, kiuj ĝis nun ne aperis. La ŝipanaro laŭ mi estas progresemaj kaj apertaj homoj, sed la ekstremistoj pro sia laŭta argumentado kaj senprecedenca demagogio estas danĝeraj. La tasko de „stiranto” de la ŝipo estas, se li jam akceptas ĉi-specajn produktojn, doni eblecon al rebato. La arbitra fermo de la diskuto post artikolo de Marszałkowski ne atestas pri gardo de la ekvilibro. Krome, tia sinteno donas falsan bildon pri la situacio en apartaj landoj, kaj tio malkontentigas. La nuntempa prenegon de la religiaj ungegoj sur la pola ĉiutaga vivo plej bone ilustras la vortoj de nuna vicĉefministro Goryszewski: „Ne gravas ĉu en Pollando estos kapitalismo, ne gravas ĉu en Pollando estos libereco de la vorto, ne gravas ĉu en Pollando estos bonstato – plej gravas, ke Pollando estu katolika”. Por esperantistoj tamen plej gravas havi valoran, altkulture humanisman revuon, kiu helpas al ni pli bone kompreni la mondon kaj laŭ modestaj eblecoj ion pozitivan fari.

Zofia Banet-Fornalova, Pollando

Romkatolika naskolimigo

Kiel membro de la Romkatolika Eklezio mi volas reagi al la letero de Furio Gabbrielli (MONATO, 1992/11, p. 7), kiu plendas pri la demagogio de la papo en Romo, kiu daŭre malpermesas naskolimigon. Tiu aserto estas falsa, ĉar la Eklezio jes permesas naskolimigon (pli ĝuste konciplimigo – ĉar ni firme asertas, ke ekde la koncipiĝo la homa vivo estas sankta kaj respektenda kaj ni do rifuzas ĉian for-

mon de abortigo). Sed ni ankaŭ asertas ke naskolimigon rajtas decidi ne iu ajn (nur la geedzoj), ne pro iu ajn kialo, kaj ne per iu ajn metodo (nur naturaj metodoj). Tiu instruo fontas el encikliko *Humanae Vitae*, verkita de Paŭlo 6a jam antaŭ pli ol du jardekoj. En mia lando ofte okazas en katolikaj paroĥoj kursoj pri naskolimiga metodo de d-ro Billings, kiu – inter la metodoj akceptitaj de la Eklezio estas la plej fidinda. Eble s-ro Gabbrielli ne konsentas kun nia instruo kaj MONATO estas libera forumo kie li rajtas esprimi tiun malkonsenton. Sed li certe ne rajtas falsi faktojn.

Daniel Alberto Cotarelo García, Argentino

Vidpunkta malpravo

Kun konsento mi legis la artikolon „Milito kaj religio” (MONATO, 1993/2, p. 5) ĝis mi devis kapti min ĉe la kapo legante, ke „religioj evoluis kaj evoluigis ĝeneralan etikon” kaj „kristanismo kontribuis al elformado de okcidenta humanismo”. Mi akre kontraŭas tiajn asertojn. Ili estas malveraj. Religioj ĉe sia estiĝo nur transprenis tiaman ĝenerale akceptatan etikon, kiun ili dogme konservis. Ni prenu kiel ekzemplon kristanisman. Kristana etiko estas neniel origina. Ekzemple: „amo al malamiko”, prezentata kiel tipe kristana, troveblas ankaŭ ĉe judoj (Salamono) kaj aliaj antikvaj kulturoj. Evoluo de etiko ne okazis pro kristanismo, sed ofte kontraŭ ĝi. Ni pensu pri eksterkristana humanismo, kiu devigis eklezion ĉesigi sorĉistinprocezojn. Aŭ ĉu ne estis kristanismo, kiu longe batalis kontraŭ agnosko de menso- kaj konsciolibereco? Kiel longe daŭris, ĝis kristanismo kondamnis sklavecon aŭ ĝis ĝi komencis interesiĝi pri ofte neelteneblaj vivkondiĉoj de laboristoj? Okazis nur post kiam aliaj jam delonge faris tion! Kaj ekde kiam kristanismo kondamnas militojn? Ĉu ne ekde kiam eklezioj perdis simpatiojn pro sia forta subteno al Hitler, Mussolini kaj Franco? Kiel estas kun egaleco de virinoj en kristanaj organizaĵoj? En dudeka jarcento oni kontraŭargumentas per antikvaj bibliaj eldiroj! Cetere, ĉu vi scias, ke la vatikana jurisdikcio ne konformas al la ĉarto de UN pri homaj rajtoj? Religioj neniel kontribuis al evoluo de etiko kaj humanismo, male, progreso de humanismo devigas religiojn ŝanĝi siajn starpunktojn, por ne perdi subtenon de homoj.

Jiri Proskovec, Germanio

Malprava vidpunkto

La rubriko „El mia vidpunkto” estas le-

ginda teksto, ne nur ĉar ĝi estas profesie bone verkita, sed ankaŭ ĉar ĝi enhavas ideojn, pri kiuj certe ne ĉiuj konsentas. [...] La naiveco de la aŭtoro atingis kulminon en en la teksto „Nevenkebla egoismo” (MONATO, 1992/12, p. 5), kie li proponas i.a. ke ni pagu dekfoje pli por kilogramo da kafo por tiel helpi al la subevoluintaj landoj, kiujn eŭropanoj puŝis en multjarcentan mizeron. Laŭ Maul estas „unu precipe, ĉefa kaj kerna afero kaj postulo: ... ni funde ŝanĝos la mondan ekonomian sistemon en direkto al justeco”. Kaj por justigi tiun postulon li ripetas la refrenon pri la „koloni-teroristoj” kies posteuloj vivas riĉe je kosto de la homoj en (eks)kolonioj”. [...] Supozeble kelkaj germanaj ĵurnalistoj ĝis nun ne scias pri la kreskanta nombro de afrikaj intelektuloj kiuj honeste deklaras ke la mizero de la afrikaj landoj ne havas siajn kaŭzojn ĉe la ekskoloniistoj, sed ĉe la propraj politikistoj de la tri lastaj jardekoj. Sufiĉas legi la tekston pri Ganao (MONATO, 1992/12, p. 9) por kompreni kiamaniere iu bonfarta lando fuŝiĝis per siaj propraj homoj, ne per la eŭropanoj. Tial la kerna afero kaj postulo de Maul estas grandparte sensenca. Kio necesas, estas ŝanĝoj en la vivmanieroj de la koncernaj homoj, speciale de iliaj regantoj, se ili volas atingi la vivnivelon, kiun Maul kaj multaj eŭropanoj deziras al ili. [...] Ni pripensu kelkajn faktojn: ... oni elkalkulis ke, eĉ se donacantaj landoj centobligus sian financan helpadon, oni ankoraŭ bezonus 60 jarojn por ke la evolulandoj atingu la nivelon kiun la okcident-eŭropaj landoj nuntempe havas. [...] Ankaŭ nia generacio faras siajn erarojn kaj precipe kelkaj el niaj samtempuloj faras eĉ grandegajn. Sed ĉu niaj posteuloj devas vivi kun kulposento pri tio? Ni ĉesigu kulpigi niajn antaŭulojn kaj ni provu helpi niajn samtempulojn per seriozaj metodoj, ne per fantaziadoj. Fine dirite, kiam temas pri la helpo al la Tria Mondo, mi preferas esti kondiserata kiel egoisto ol kiel naivulo. W.M.A. De Smet, Gabono

Vestaĵoj faras la... ventron

Normale min tre imponas la altanivelo kaj profesieco de la reklamado kaj publikado de MONATO kaj FEL, sed la reklamo sur la dorsa kovrilo de MONATO 1993/2 iom trompis miajn atendojn. Mi ne dubas, ke la korpo tie videbla apartenas al tre estiminda persono, sed por reklami trikvoston, ĉu ne eblis trovi ventron pli belan?

Edmund Grimley Evans, Britio

Malobeo al patrujo

Dankon al Antanas Krencėvičius pro lia artikolo pri la naziepoka agado de la japana diplomato Sugihara (MONATO, 1993/2, p. 16). Estas konsolo por ni japanoj, kiuj estas malamataj ĉie en la mondo pro dumkaj post-militaj bestagoj. La legantoj nun scias ke ekzistis almenaŭ unu homeca persono inter japanoj. La valorigo fare de sinjoro Krencėvičius kaj de la litova popolo estas despli rimarkinda ĉar la savitoj ne estis iliaj samgentanoj, sed judoj.

Yamasaki Seikō, Japanio

Fremdulmalamo

Kiam ŝtato forpelas alilandan laboriston, memkompreneble iĝas vaka posteno por enlandano. Ne eblas malakcepti tion kiel fakton. Tamen ekzistas taŭga respondo. Jen: la alilandano kaj ties familio bezonas, por sia vivo, varojn kaj servojn, do elspezas, do provizas laboron por pli da laboristoj. Tiel mi respondus al la faŝismaj sintenoj, al kiuj aludas Sébastien Conoir (MONATO, 1993/2, p. 6).

Peter A. Danning, Britio

Internaciaj idoj

Piede de mia artikolo pri ĉesojla lakto-liverado (MONATO, 1992/11, p. 13), aperis invito informi min ĉu tia servo estas unike brita kutimo. Tri monatojn poste, mi estis ricevinta nur du respondojn. Unu de nederlandano, alia de kubano. Tiu lasta skribis ke la servo estis kutima en Kubo ĝis antaŭ dudek jaroj, sed ĉesis por ŝpari aŭtojn. Tamen, popola tradicio atribuis al la laktoliveristoj, krom la kvalitoj de helpemo kaj aŭto, certan emon al kokrado ĉe matene liberaj dommastrinoj. Tio amuzis min, ĉar ankaŭ en Britio oni ŝercas, ke, se infano ne similas al iu en sia familio, lia aŭ ŝia patro estas laktoliveristo!

David Curtis, Britio

Unuiĝinta Naciaro

Mi preferas uzi „Unuiĝintaj Nacioj“-n ol „Unuiĝinta Naciaro“-n. Laŭ mia opinio, ne temas pri Esperanta pureco, sed pri senca nuanco: „Unuiĝinta Naciaro“ estus pli homogena ol „Unuiĝintaj Nacioj“. Oni povos paroli pri „Unuiĝinta Naciaro“ kiam la nunaj „Unuiĝintaj Nacioj“ estos malpli malsamaj!

Gaston Riste, Francio

Pendolinaj trajnoj

Multe min interesiĝis la raporto pri pendolinaj trajnoj (MONATO, 1993/1, p. 4), de kiuj la Germana Fervoja Sistemo jam uzas 20. En Usono la firma *Amtrak* baldaŭ enkondukos provvojaĝon de ĉi tia trajno inter la

urboj Vaŝingtono kaj Nov-Jorko. Tamen, ĉi tie en Kvinslando, la plej norda ŝtato de Aŭstralio, la registaro jam decidis aĉeti kaj funkciigi la pendolinan trajnon inter la ĉefurbo, Brisbano, kaj Rockhampton, je distanco de 638 km. La trajno faros la vojaĝon en 7 horoj kaj 10 minutoj – 3 horojn pli rapide ol per aŭtobuso, 2 horojn kaj 15 minutojn pli rapide ol la nuntempa trajno, kaj 30 minutojn pli rapide ol per aŭtomobilo. Aŭstralio, kvankam juna ŝtato, estas inter la ĉefkaj faktoroj en la rapide progresanta trajn-transporta sfero.

Kay Howe, Aŭstralio

Re-reagoj

Mi ne povas tute akordi kun Wolfgang Günther (MONATO, 1993/2, p. 7). Li rajtas diri ke Eŭropa Komunumo estas precipe ekonomia, sed se ni volas plibonigi la eŭropan vivmedion, necesas ke ni konsentu pri sama leĝaro en ĉiuj vivmediaj sferoj. Urĝas do la kreado de Eŭropa Mediagentejo, pri kiu oni jam decidis. La kreado prokrastiĝas ĉar la eŭropaj ŝtatoj ne interakordis pri ĝia... sidejo. Mi ankaŭ kontraŭas la opinion de Masatomo Uĉida (MONATO, 1993/2, p. 7). Efikeco de produktado (de aŭtomobiloj) oni mezuru per kvanto da laborhoroj. Se necesas 17 horoj en Japanio, 25 en Usono kaj 36 en Eŭropo, la japana efikeco estas plej granda. Brave Japanio! Tamen, se temas pri internacia komerco, gravas aliaj aferoj. Japanio multjare atingis pli kaj pli eksterajn superfluajn komercenspezojn. La japana registaro bone scias, ke internacia komerco nur eblas, se iu ekvilibro permesas al ĉiuj landoj pagi siajn importadojn per eksportadoj. Ĉiujare la japana registaro sciigas ke ĝi tuj decidus korektaĵojn pri tio. En 1992, japanaj enspezoj altiĝis al 107 miliardoj da dolaroj. Tio ankaŭ estas doloriga realo kaj Japanio ne miru se aliaj landoj kontraŭos ĝin per doganpagoj aŭ per altigo de envaloro!

Raymond Marty, Francio

MONATA lingvo-uzo

Oni kutimas, ke de tempo al tempo tiu aŭ alia lingvaĵo en MONATO iom surprizas, kaj estus tede kaj maljuste, se mi detaligus ĉiujn erojn, kiuj ne plaĉas, ĉar ĝenerale la artikoloj estas lingve kontentigaj. Pri du eroj en lastaj numeroj mi tamen devas nun skribi. La unua ero temas pri la artikolo pri alfabeteco (MONATO, 1993/1, p. 18) en kiu ŝokas la strangaĵo „literacio“. Ŝajnas ke tiu vorto povas esti sinonimo de „alfabeteco“, tiel ke „literaciigo“ signifus „alfabetigo“. Unue, kiel anglalingvano mi ne tuj komprenas la

ligon kun la angla *literacy*. (Aci-vortoj en Esperanto preskaŭ ĉiam respondas al latinidaj vortoj kun finaĵo -ation, dum anglaj acy-vortoj plej ofte estas derivaĵoj el adjektivoj, esprimante ian econ.) Due, tiu angla vorto neniel estas internacia, la plej multaj eŭropaj lingvoj havas ian ekvivalenton de „alfabeteco“. La dua ero estas pli esenca terminologia plendo. Ĝi rilatas la klarigon pri la nova strukturo kiu ligas la membroŝtatojn de EK kaj ELKA (MONATO, 1993/2, p. 8). ELKA nomiĝas diverse en la diversaj oficialaj lingvoj de EK, sed la esperanta ekvivalento estus „Eŭropa Ekonomia Areo“ aŭ „Eŭropa Ekonomia Spaco“. Ni ne kreu novan strangaĵon kiel „Eŭropa Ekonomia Sfero“-n. Sfero estas des pli maloportuna tie ĉi, ĉar ĝi implicas ian neprecize difinitan ĉirkaŭaĵon: diversaj landoj, ekzemple Albanio aŭ Malto, estas en la „eŭropa sfero“ sed ne apartenas al la formale starigita areo. „Areo“ verdire estas la preferinda termino, ĉar ĝi plej bone rilatas al teritorio kun difinitaj limoj, kia estas tiu EEA. Mi do petas, ke oni kurtimiĝu paroli pri la Eŭropa Ekonomia Areo (EEA) kaj ne kreu pli-malpli fantaziajn terminojn, kiuj konfliktas kun ekzistantaj oficialaj titoloj.

Brian Moon, Luksemburgo

Ĉeĥio – Ĉeĥa Respubliko?

Mi scivolemas pri la nomo de la ĵusŝtatiĝinta okcidenta parto de eksa Ĉeĥoslovakio. MONATO uzis „Ĉeĥion“, kaj en la decembra eldono, kaj en LA JARO 1993. Mi aŭdis (el ne-ĉeĥa fonto tamen) ke ĉeĥoj ne akceptas tiun nomon ĉar ĝi estas la sama ol tiu de la hitlera pupŝtato. Mi aŭdis ke, tial, nur la nomo „Ĉeĥa Respubliko“ estas akceptebla. Ĉu tio pludiskuteblas? Marko P. Maertens, Belgio

Fidela leganto petas...

Ĉu vi ne povus en ĉiu numero de MONATO mencii la nomon kaj adreson de la persono kiu respondecas pri la rubriko leteroj? Vi ja postulas sendadon de leteroj aŭ artikoloj al la koncerna respondeculo, ĉu ne?

Bertil Englund, Germanio

Pri la enhavo de leteroj respondecas la aŭtoroj mem. La redakcio havas la rajton mallongigi leterojn. Reagoj al artikoloj ricevas prioritaton. Skribu al:

**FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MONATO (Leteroj)
Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen
Belgio**

Peruo bezonas miraklon

Naŭ monatojn post la aŭtokrateca maldungo de la perua parlamento fare de prezidento Fujimori la 5an de aprilo 1992, la nova Demokratia Konstitucidona Kongreso, la parlamento de Peruo, kunvenis komence de januaro 1993. Per tio, la longa ŝtata krizo finiĝis, kaj la formala disdivido de la potenco estas restarigita. Por garantii la harmonian laboron, Fujimori ne partoprenis la inaŭguron. Sed li publikigis dekreton, laŭ kiu li akceptas la novan konstitucion kaj submetas sin sub la leĝaro. Tamen, la malnovaj problemoj de Peruo restas, kiel celas montri la sekvanta artikolo. (red.)

Ĉu Vargas Llosa aŭ Fujimori?

En 1990 Peruo elektis novan prezidenton de la respubliko. La plimulto de la homoj, ne nur en la propra lando, sed ankaŭ en la najbaraj respublikoj, atendis la venkon de la karisma verkisto Maria Vargas Llosa [Ljosa]. Kiam la dato de la voĉdonado alproksimiĝis, pli kaj pli da civitanoj subtenis la nomon de Alberto Fujimori. Li promesis, iom nebule, la bezonon realigi reformojn en teknokratia kaj ekonomio (sub la devizo *Cambio 90*, Ŝanĝo 90). Kiel konate, la japandevena Fujimori fine elektiĝis. Vargas Llosa forlasis Perumon por plenumi pli profitdonan laboron kiel literaturisto.

Esperiga japano

Antaŭ la elekta kampanjo, la nova prezidento ne estis konata kiel politikisto. Alberto Fujimori kaj lia edzino devenas de japanaj familioj, kiuj migris en Perumon por labori en ĉi tiu amerika lando. Post Usono, Peruo havas la plej altan nombron de japandevenaj loĝantoj en la tuta amerika kontinento. Do, la promeso de Fujimori haltigi la gigantan inflacion, malpliigi la senlaborecon, kiel ankaŭ la deziro ĉesigi la malnovajn politikajn disputojn donis esperon al la voĉdonantoj. Ne malmultaj kredis, ke japandevena homo preferus agi kaj ne nur paroli – en Latin-Ameriko ja la inversa tendenco estas observebla.

Sendero Luminoso

Sub la nova registaro la inflacio ja falis. Kaj oni esperis, ke la novaj normoj por la agrikulturo kaj industrio donus pli da laboro al la homoj. Sed tio ne okazis, kaj hodiaŭ la nombro de senlaboruloj estas pli alta ol antaŭ la voĉdono en 1990. Oni esperis ankaŭ, ke samtempe solviĝos du problemoj: tiu de la terorista partio *Sendero Luminoso* (Luma

Pado) kaj tiu de la kreskantaj komerco kaj konsumo de kokaino. Luma Pado estas partio aganta laŭ difinitaj komunismaj principoj, kiu sekvas la teoriojn de Trockij kaj jam dum pli ol dek jaroj batalas per partizana milito. La kokaina problemoj fakte ne estas facile solveblaj, ĉar la kokao kreskas nature sur la altaj montegoj de la regiono, kaj la suĉado de la folioj estas tradicio de jarcentoj en la lando. Pro tio la politikistoj preferas forgesi ĉi tiun temon.

Malnovaj problemoj restis

Sub la nova prezidento, la politikaj problemoj efektive ne ŝanĝiĝis. En aprilo 1992, post malpli ol dujara regado, Fujimori forpelis la deputitojn kaj ministrojn, formante novan registaron. Ĝi konsistas esence el generaloj kaj du financistoj, kiuj komencis drastan ŝanĝon vendante ŝtatajn entreprenojn al privatuloj. Tiuj ĉi lastaj ne investis kapitalon en Perumon, sed uzis tiun en aliaj landoj, ĉefe Usono. Do, la celo krei laborlokojn en Peruo



Prezidanto Alberto Fujimori kaj edzino Susana montras la nigrajn makulojn sur la fingroj indikantajn ke ili voĉdonis.

ne realiĝis. Eĉ male, pli da senlaboruloj eniris la rangojn de mizeruloj. En pasinta septembro, Fujimori ricevis neatenditan donacon, se oni povas tiel diri: policanoj arestis Abimael Guzmán, unu el la gvidantoj de *Sendero Luminoso* (laŭ la polico la ĉefgvidanto). Sed la perdo de Guzmán ne ĉesigis la laboron de la teroristoj, kaj la ekonomio daŭre stagnas. Tial, en oktobro la prezidanto decidis efektiviĝi baloton por konstitucia reformo, manovro bonkonata en ĉi tiu



Abimael Guzman, gvidanto de Sendero Luminoso, en montrofenestro dum gazetara konferenco.


kontinento. Ok tagojn antaŭ la fino de novembro okazis la voĉdonado, kiun gajnis la prezidanto! Sed la nomoj de la partioj, escepte tiu de la prezidanto, ne estis konataj ĝis du semajnoj antaŭ la voĉdona dato; tial la du tradiciaj partioj decidis bojkoti la voĉdonadon. La oficialaj rezultoj donis 45,3 % de la voĉoj al la oficiala *Cambio 90*, 8,3 % al la kristana populara partio. Etajn procentaĵojn ricevis aliaj partioj. Pli ol 40 % ne voĉdonis. Nun la novaj deputitoj preparas novan konstitucion por Peruo.

Ĉu inkaoj helpos?

Dume, usonaj kaj japanaj financistoj venis en la landon celante renaski la ekonomion. La demando estas kiun ekonomion oni renasku? Ĉar en la lando ne ekzistas ekonomio, kiun oni povas vere renaski, kiel iu ekonomisto de la ĉefurbo Limo diris: „La japanoj faris miraklojn en sia lando, do eble japandevena persono faros la samon ĉi tie. Tamen mi emas kredi la aŭgurojn de miaj inkaaj antaŭuloj!” Kaj tiuj aŭguroj ne donas grandan esperon, eĉ se la prezidanto estas homo, kiu havas sciojn pri japanaj mirakloj. Amador DIAZ

Mond-mapo de homaj rajtoj


(stato 1991)



fonto: UN-raporto

© Globus

Landoj, kie la homaj rajtoj estas respektataj...



...plejparte



...nur reduktite



...malplejparte

665 milionoj da homoj

2 475 milionoj

2 140 milionoj



40 demandojn pri ĉiu ŝtato oni starigis; ili ampleksis la kompletan katalogon de homaj rajtoj de l' UN-ĉarto, de libereco de torturado ĝis senproblema grupokunveno. La malĝojiga rezulto: en eĉ ne unu lando de l' tero al ĉiuj demandoj eblas respondi per klara „jes”. La mapo spegulas la situacion, kiel ĝin priskribas la tria eldono de UN-raporto Monda Gvidlibro de Homaj Rajtoj. Tamen, la respondoj datas el la jaro 1991; intertempe – oni pensu ekzemple nur pri Balkano kaj eksa Sovetio – probable ne malmultajn landojn kaj regionojn oni devus meti en alian, apenaŭ pli bonan kategorion...

opinio

Vangofrapo por la homa digno

Laŭ propono de Robert Torricelli [Torriĉeli], senatano de Usono, la registaro de tiu lando pretas sankcii leĝon, kies enhavo estas pliakrigo de la jam kontraŭhoma ekonomia blokado, kiun nia norda najbaro trudis al Kubo, kies nura historia krimo ŝajnas esti la fakto, ke kubanoj ne deziras akcepti obeeme la postulojn de fremda registaro. Se ni estis dum pluraj jarcentoj hispana kolonio kaj batalis heroe ĝis atingo de nia sendependeco, kial Usono sentas sin devigata limigi la suverenajn rajtojn de nia respubliko, altrudante al Kubo tiom kontraŭrajtan kaj eksterteritorian leĝon, kiu krome atencas ankaŭ kontraŭ la libervola decido de ĉiuj registaroj de la mondo komercadi kun nia lando. Neniam antaŭe en la historio de l' internacia juro oni povis trovi similan agadon flanke de registaro, kiu nomas sin mem „defendanto de l' homaj rajtoj”. Ne ekzistas, almenaŭ laŭ miaj scioj, leĝoj ie ajn sur tiu ĉi planedo, kiuj pravigu tiun unuflankan decidon de Usono malpermesi al ne gravas kiu lando komercadi kun Kubo.

Verŝajne la leĝdonantoj de Usono forĝis la historion de sia propra lando. Ili ne memoras, ke ili estis kolonioj kaj luktis ĝis atingo de la tiom sopirata sendependeco. Ili ankaŭ ne memoras la enhavon de la Ĉarto de Unuiĝinta Naciaro.

Mi ne scias, ĉu Torricelli estas juristo. Mi ankaŭ ne scias, ĉu la reprezentantoj kaj senatanoj de Usono estas juristoj aŭ ne. Kion mi ja scias, estas ke neniuj registaro rajtas tiom agreseme kaj kontraŭhome ĉirkaŭstreĉi popolon klopodante ĝin venki per malsato. Ĉu la usonanoj akceptus tion, se tiu leĝo direktiĝus kontraŭ ili?

Kiel kubano mi ne povas ne esprimi mian indignon antaŭ tiu leĝo. Esperable ĉiuj dignaj homoj de la mondo apogos nin, ĉar la rajto estas je nia flanko. Dume, mi finos per vortoj eltiritaj de la verkaro de nia nacia heroo, José Martí, kiu bonege bildigas la kuban senton: „Jen la supera leĝo, ĉefa leĝdonanto kaj juĝisto de juĝistoj: la homa konscienco.”

Juan Lázaro BESADA Tóledo, Kubo

Ekskomunistoj en la parlamenton

Ekskomunistoj gajnas la balotojn kaj ricevas novan ŝancon por demokrate realigi siajn idealojn.

Fine de oktobro 1992 en Litovio okazis balotado por nova parlamento. Tion antaŭis tre forta kaj por oktobro surpriza neĝado. Tiu stranga natura fenomeno alportis ankaŭ tute neatenditan rezulton en la politiko. La litova parlamento decidis, ke la nova Sejmo (tiel la litova parlamento jam nomiĝis dum la sendependeco de la lando inter 1918 kaj 1940) konsistu el 141 membroj. 71 personoj el ili devas esti elektitaj en unu-mandataj elektodistriktoj, kaj la alia duono elektiĝas laŭ proporcia sistemo. Entute 17 diversaj partioj, partiaj koalicioj kaj organizaĵoj kandidatiĝis por la nova Sejmo. Notindas, ke samtage okazis ankaŭ referendumo por nova litova konstitucio.

Ekskomunistoj venkis

La postan tagon, la amaskomunikiloj diskonigis vere neatenditan rezulton. Post kelkjara interrompo, la eksaj komunistoj – nun ili nomas sian organizaĵon Litova Demokrata Laborista Partio (LDLP) – preterrapidis kaj superis la Litovan Popolfronton Sajudis! Finfine, post la dua balotetapo je la 15a de novembro, la disdivido de la mandatoj en la litova parlamento aspektas jene: LDLP okupos 73 lokojn, Sajudis – 30, Kristana Demokrata Partio – 18, socialdemokratoj – 8, po 4 mandatojn aŭ malpli akiris aliaj partioj, inter alie tiu de la pollingva malplimulto (Pola Unio), kvazaŭ neglektataj de la litova publika atento. Por la nova konstitucio voĉdonis 53 procentoj de la balot-



Algirdas Brazauskas, gvidanto de la Demokrata Laborista Partio (antaŭa Komunista Partio) elektiĝis kiel nova prezidento de Litovio.

intoj. Ĝi antaŭvidas la organon de ŝtatprezidanto. Tiel verŝajne post nelonga tempo, la litovoj denove balotos, kaj supozeble partoprenos du konataj kandidatoj: 'dekstrulo' Vytautas Landsbergis kaj 'maldekstrulo' Algirdas Brazauskas.

Rezulto ne plaĉis al ĉiuj

La ĉefo de LDLP, ekskomunisto Algirdas Brazauskas, konfesis, ke tian rezulton li eĉ ne supozis. Li dankis al la voĉdonintoj, aparte al la junularo, kiu subtenis la programon de la maldekstruloj. Tamen, la brila sukceso de tiu partio ne plaĉis al ĉiuj. Kiel unuaj reagis la studentoj: En la urboj Vilnius kaj Kaunas ili esprimis sian malaprobos per manifestacio. Iuj dekstremaj organizaĵoj fondis eĉ kontraŭkomunistan stabon kun la celo atenteme observi, ĉu vere novkomunismo ne renaskiĝas en Litovio.

Kio plue?

Kiel povis okazi, ke en Litovio, kiu en eksa Sovetio ofte estis konsiderata kiel simbolo de demokratiaj reformoj, tute neatendite revenis tiuj, kiuj gvidis la landon antaŭ la reformoj? La litova parlamentestro Landsbergis klarigis, ke LDLP havas pli da spertoj en politika propagando kaj ke ĝi sukcesis altiri homojn per promesoj je malpli altaj prezoj, pli grandaj salajroj kaj pensioj. Krome, Landsbergis estas certa, ke la balotkampanjon influis ankaŭ Ruslando, kiu malgraŭ pozitivaj interkonsentoj kun Litovio malhelpis la liveron de gaso kaj nafto. Ĝuste tiu obstaklo kaŭzis, ke longe la litovoj ne povis hejti siajn hejmojn kaj ricevi akvon. Do, la maldekstruloj akuzis la eksan registaron pro nekapablo ĝustatempe solvi tiujn problemojn. Due, la rifuzo de la planekonomio kaj la forfalo de ŝtata subvencio kaj la manĝaĵoprezoj rezultigis galopantan altiĝon de prezoj, kiuj por multaj iĝis jam ne plu elteneblaj. Do, balotante por la eksaj komunistoj, la homoj esperis solvon de la malfacilaj ekonomiaj problemoj.

Sajudis en krizo

Sajudis, kiu kiel heroldo de la tuta popolo strebadis al la sendependeco, dum la lastaj jaroj disfalis kaj

perdis sian reputacion de unueca kaj forta organizaĵo. Ĝia iama populareco velkis. Sed multaj subtenantoj de Sajudis precipe nur kritikis la komunistojn sen prezenti konkretan planon por plibonigi la reformojn en la lando.

Ĉu komunismo renaskiĝos?

Ĉu vere la novkomunismo naskiĝos en Litovio? Laŭ Brazauskas tiu timo estas vana. Li deklaris, ke liaj deputitoj konsekvence daŭrigos la politikon de la reformoj kaj de la plifirmiĝo de la litova ŝtato kaj postulos ankaŭ la senprokrastan forveturon de la rusa armeo. Samtempe li invitis ĉiujn politikajn fortojn kuniĝi en granda koalicio favore al la prospero de la Litova Respubliko.

Laimius STRAŽNICKAS



En la tempo de Sovetio, ĉiuj litovoj estis sovetiaj civitanoj. Ĝis la 3a de novembro 1991 la loĝantoj de Litova Respubliko devis decidi, ĉu ili akceptas la litovan ŝtatanecon aŭ ĉu ili volas resti sovetiaj civitanoj. Interesa estas la decido ĉe la etnaj malplimultoj. Laŭ enketo 55 procentoj de la rusoj loĝantaj en Litovio kaj 52 procentoj de la poloj elektis la litovan ŝtatanecon. Aliaj ciferoj: 42 % de la rusoj kiuj ne akceptis la novan ŝtatanecon, daŭre volos loĝi en Litovio, 15 % elmigros kaj 43 % ankoraŭ ne scias kiel decidi. 67 % de la poloj rifuzintaj la litovan ŝtatanecon restos en Litovio, 7 % decidis elmigri kaj 26 % ankoraŭ malcertas. La unuaj kiuj ricevis la novajn litovajn pasportojn estis la sportistoj, kiuj partoprenis la vintrajn olimpikajn ludojn en Albertville (Francio). Ĝis julio 1993 la novajn pasportojn devos ricevi ĉiuj, kiuj volas iĝi civitano de Litova Respubliko. La pasportoj (presitaj en Britio) validas por longdaŭra uzado enlanda kaj eksterlanda. Jam pluraj ŝtatoj deklaris sian pretecon senvize akcepti la civitanojn.

Laimius STRAŽNICKAS

Trompantaj promesoj

Kun la elektoj pasintaŭtunaj (v. MONATO 1/93, p. 8) la registaro de Rumanio ŝanĝiĝis. Sed la promesoj pri altiĝo de la vivnivelo, la propono de novaj laborlokoj, ktp., ne realiĝis. La nuna registaro gvidata de ĉefministro Nicolae Vacaroiu [Vakaroiu] daŭrigas la reformon al merkata ekonomio. Ĉi tiu reformo estis komencita de eksĉefministroj Petre Roman kaj Theodor Stolojan [Stolojan]. La unua demisiis en septembro 1990, la dua rezignis en oktobro 1992.

Mizera vivo

Nun la prezoj estas tre altaj. Kaj ili daŭre altiĝos ĝis majo 1993. Tiam, laŭ la promeso de eksĉefministro Stolojan la prezoj stabiligos. Kaj temos pri la lasta prezaltiĝo, ĉar en la sama monato la ŝtataj subvencioj estos tute likviditaj. La vivnivelo estas mizera, la salajroj malgrandaj. La mezuma monata salajro de laboristo estas malpli ol 55 usonaj dolaroj. Nun 1 usona dolaro egalas al 470 rumanaj leoj, kompare kun 20 leoj en 1989. Nuntempe estas proksimume 900 000 senlaboruloj (el 23 milionoj da loĝantoj). Tiu nombro daŭre kreskos, precipe inter gejunuloj kun mezaj kaj universitataj klercoj kaj inter virinoj. Junulo kun meza klereco pergajnas proksimume 5000 leojn (11 dolarojn) monate. La impostoj por salajroj estas altaj (mezume 20 %). Akompane al la inflacio estas eldonataj novaj bankbiletoj kun pli kaj pli da nuloj: ĝis 1991 la plej alta monbileto estis paperaĵo

de 100 leoj. Nun validas monbiletoj en alteco de 500, 1000, 5000 kaj 10 000 leoj. Alia interesa informo: la materialo, el kiu estas produktita la nova monero de 1 leo, kostas 14 leojn.

Korupta socio

La rumana socio estas tre korupta. La korupto estas renkontebla ĉie: en instruado, malsanulejoj, ĉe la polico, justico, en la komerco kaj eĉ en eklezioj. En la bazaroj, kie regas la libera ekonomio, negocadas ĉefe migrantaj ukrainoj kaj moldovanoj. Ili vendas precipe vestaĵojn kaj objektojn por hejma uzado. Ili estas pli malmultekostaj ol la samaj el Rumanio. Kompreneble, iliaj vendaĵoj estas tre serĉataj kaj aĉetataj. Inter tiuj oni trovas kelkfoje ankaŭ armilojn, precipe pistolojn kaj grenadojn. La prezo de grenado povas esti inter 10 000 kaj 15 000 leoj. Demandite de policano pri la deveno de la armiloj, iu vendisto respondis: „Mi luktis en Afganistano.”

Redono de posedaĵo

En 1992 aperis du novaj leĝoj: pri arbaroj kaj pri ŝtataj entreprenoj. Laŭ la unua, ĉiuj familioj, kiuj posedis proprajn arbarojn ĝis 1948 (tiam la komunistoj ŝtatigis ilin), rricevas arbarojn maksimume ĝis unu hektaro. Laŭ la dua leĝo, ĉiuj civitanoj de Rumanio, kiuj estis 18jaraj ĝis fino de 1990, povas reaĉeti 30 procentojn de la valoro de la ŝtataj entreprenoj okaze de ties vendo. La valoraĵo haviĝas en formo de posedaĵo-atestiloj. Nun unu tia atestilo kostas 250 000 leojn.

Gheorghe SALAHURA

Valencilando: kompleksa nacia realo

En la sud-okcidenta parto de Eŭropo, ĉe Mediteranea Maro kaj ene de la limoj de la hispana ŝtato, kuŝas teritorio loĝata de kvar milionoj da homoj. Ĝin oni ĝenerale konas kiel Valencilandon, kvankam ĝia oficiala nomo, laŭ aktualaj hispaniaj leĝoj, estas „Valencia Komunumo”. Ne hazarde ni komencas menciante tiun nomdiferencan, ĉar malantaŭ ĝi sin kaŝas kontraŭdiraj starpunktoj pri la identeco de tiu teritorio, pri la origino kaj specifeco de ĝia lingvo kaj, kio plej gravas, pri ties estonto.

Valencilandon konkeris en la 13a jarcento kataluna kaj aragona armeo de reĝo Jakobo 1a, kunreganto de tiuj regnoj. La antaŭa loĝantaro, religie islama kaj lingve araba, devenanta de la malnovaj loĝantoj de la teritorio ekde la romia periodo, estis iom post iom forigita kaj anstataŭita de la novaj koloniintoj, venintaj ĉefe de tiuj du landoj regataj de reĝo Jakobo. La katalunoj, eĉ tie, kie ili ne konsistigis plimulton, sukcesis pro siaj prestiĝo kaj socia elstaro trudi siajn lingvon kaj kulturon al la plimulto de la nova reĝlando, kiu havis propran povostukturon kompare kun Aragono kaj Katalunio.

Tiu regno konis kreskoperiodon, ĉefe dum la 15a jarcento, kiam ĝia ĉefurbo Valencio fariĝis la granda centro de la katalunaj literaturo kaj kulturo kaj prospera haveno de la mediteranea komerco. Sed dum la sekvaj jarcentoj ekestis serio da militoj kaj malfeliĉegoj (ribelo de la „Fratarioj”, de la metiistoj kaj kamparanoj kontraŭ la feŭdaj nobeloj, kiu finiĝis per la venko de ĉi-lastaj; forpelo de la cetero de la islama loĝantaro, kio malfortigis la demografion; arma invado kaj politika okupo de la lando fare de Kastilio, profitante la okazon de la milito por Heredo de la hispania krono). Ĉio ĉi ĉesigis la politikan liberecon de la lando, kiu fariĝis tri diversaj distriktoj en la nova hispania politika organiz-



Ministoj en Rumanio devigas ĉefministron Petre Roman rezigni pri sia posteno. Li demisiis la 26an de septembro 1991.

Viajn kontribuojn por la rubriko „politiko” sendu al:
Andy Künzli
B.P. 779

CH-2301 La Chaux-de-Fonds
Svislando

iĝo kreita dum la 18a jarcento, kio grave malbonigis la oficialan kaj publikan uzon de la kataluna lingvo.

Kataluna renaskiĝo

Dum la 19a jarcento kaj la unua duono de la 20a, Valencilando, kiel la ceteraj katalunlingvaj teritorioj, konis movadon por la lingva kaj nacia restarigoj nomitan „Renaskiĝo”. Sed tiu movado neniam atingis la forton de la samnoma en pli nordaj teritorioj, en Princlando Katalunio, aŭ simple Katalunio, la parto industrie kaj nacie plej evoluinta ene de la tuto de la kataluna nacio.

Valencilandon formis ĉefe kamparana socio, kies riĉeco baziĝis sur prospera eksportado de vino, rizo, kaj ĉefe citrusaĵoj, kaj kiu eĉ ne estis bone strukturita ĉirkaŭ la ĉefurbo, dum la regantaj tavoloj vidis Madridon, la ŝtatan ĉefurbon, kiel la ĉiunivele imitindan ekzemplon. La rezigno pri la lingvo kaj pri la naciaj karakterizaĵoj, estis ĉiutage pli granda, kaj ŝajnis procezo ne renvers-ebla. Dum la 60aj kaj 70aj jaroj de nia jarcento, tamen, la hasta industriigo, kiun travivis Valencilando, la forta turisma impulso, la apero de novaj tavoloj de memstaraj profesuloj, intelektuloj kaj homoj kun universitata klereco, kune kun la kreskanta influo, kiun la kataluna nacia movado ekhavis en la princlanda teritorio, impulsis „duan renaskiĝon” inter la valencianoj – ĉi-foje kun forta dozo da lingva, kultura, kaj ankaŭ politika restarigoj.

Lingva demando

Tiu procezo, tamen, alfrontis gravajn malhelpojn. La ĉefa estis apero de fortoj, kiuj surbaze de lingve kontraŭsciencaj kaj politike reakciaj starpunktoj, neis la unuecon de la lingvo parolata de valencianoj kun tiu de la cetero de la komuna trunko de la kataluna kaj, sekve, la katalunecon de la valencia loĝantaro. Tiu disputo generis fortajn polemikojn, kiuj eĉis en aliaj aspektoj de la publika vivo kaj parte haltigis la procezon de la nacia restarigo.

Malgraŭ tio, la nuna situacio de Valencilando atingas, jaron post jaro, pli altan lingvokulturan nivelon (ne tiom politikan). La kataluna, kunoficiala kun la hispana en leĝaj tekstoj, sed sub la oficiala nomo „valencia”, estas devige instruata en ĉiunivelaj instrucentroj kaj estas uzata, almenaŭ teorie, samnivele al la hispana en la oficialaj institucioj. Ĝia uzado fare de la civitanoj, tamen, ŝajnas senprograsa, kvankam plialtigis ĝia socia prestiĝo kaj vere eksterordinare ĝia uzo en la beletra kaj kultura mondoj. Figuroj kiaj Joan Fuster, Vi-

cent Andrés Estelles, Enric Valor estas ŝlosilaj ekzemploj de la valencia kontribuo al la tuto de la kataluna literatura produktado.

La duobla identec-krizo, kiun kreas la nuna situacio (nacia aparteno de la valencianoj al Hispanio aŭ al la tuto de la kataluna nacio – Kataluna Landaro – kaj akceptado aŭ malakceptado de ilia lingvo (la valencia) kiel integra parto de la kataluna lingvo – generas reajn polemikojn kaj malhelpas globalan respondon de la loĝantaro, kiam temas pri difino de sia estonteco kiel popolo.

Ĉiuokaze, Valencilando, unu el la ekonomie kaj socie plej prosperaj kaj

dinamismaj teritorioj de la hispana ŝtato, travivos dum la venontaj jaroj, pro la alveno en la civitanan vivon de novaj generacioj, formitaj ene de ia nacia normaleco, decidan etapon de sia historio – ĉefe pri tio, kio tuŝas la propran identecon kaj ĝiajn rilatojn kun najbaraj teritorioj. Precipe la streĉo de la ĉefurbo, Valencio, kun la ĉefurbo de Katalunio, Barcelono, kaj la grado de kunlaboro aŭ malakordo inter la diversaj politikaj grupoj kaj sociaj tavoloj kun la ŝtata registaro, kaj kun Madrido, la ŝtata ĉefurbo, povas difini en unu direkton aŭ alian la vojon, kien alpaŝos la valencianoj.

Toni ROYO

LA MONDO EN FEBRUARO 1993

2a. Havel enposteniĝas kiel unua prezidanto de Ĉeĥa Respubliko.

3a. Papo Johano Paŭlo 2a dum 10taga vojaĝo tra Afriko vizitas Beninon, Ugandon kaj Sudanon.

3a. Belorusio nuligas la malpermeson de sia Komunista Partio.

4a. 5 disidentaj membroj forlasas la Liberalan Partion de Aŭstrio gvidatan de la dekstremulo Jörg Haider kaj formas propran parlamentan frakcion.

5a. Mobutu eksoficigas sian ĉefministron Ĉisekedi. Pluraj okcidentaj landoj postulas la demision de la diktisto.

6a. EK havigas al la Moldova Respubliko specialan gaststatuson, kiun ĝuas ankaŭ aliaj eksaj komunistaj respublikoj.

7a. En Liĥtenŝtejno la Libera Listo rompas la 55jaran regadon de la 2 tradiciaj partioj. Ĉefministro Brunhart demisias. Estro de la registaro iĝas la 33jaraĝa juristo Büchel.

7a. La reganta Kroata Demokratia Unio de prezidanto Tudjman venkas en la elektoj. Sed en Istrio, parto de Kroatio, ĝi fiaskas.

11a. La ĉefo de la Itala Socialista Partio, Craxi, demisias, pro suspekto de koruptado. Li gvidis la partion dum 17 jaroj kaj estis ĉefministro dum 4 jaroj. Lia adepto, Benvenuto, iĝas lia posteulo.

12a. Eksa diktisto de Malio, Traoré, estas kondamnita je morto.

14a. Ekskomunisto Brazauskas gajnas la prezidantajn elektojn en Litovio.

15a. La nova prezidanto de Kipro nomiĝas Klerides. Danke al la apogo de la naciistoj li venkis la ĝisnunan prezidanton Vasilioj.

15a. La Nacia Konsilio de Slovakio elektas Kovac unua prezidanto.

17a. UN haltigas la liveradon de helpmaterialoj al Bosnio pro malhelpo flanke de la militantoj.

18a. La eksprezidanto de Sovetio, Gorbaĉov, devas defendi sin antaŭ t.n. „popoljuĝejo”. Al li oni riproĉas „kontraŭkonstituciajn agojn kontraŭ la sovetiaj popoloj”. La ĉefakuzito mem ne aperas. La proceson oni konsideras kiel farson de la komunistoj.

22a. La Sekureca Konsilio de UN unuanime decidas la kreon de juĝejo pri la militkrimoj en eksa Jugoslavio. UN denove liveras helpmaterialon al Bosnio. La serboj pafatakas la kroatan urbon Zadar.

23a. Okaze de la Tago de la Armeo en Moskvo miloj da komunismemaj homoj postulas puĉon kontraŭ Jelcyn.

24a. La kanada ĉefministro Mulroney, kiu oficis 8 jarojn, anoncas sian demision.

24a. La ĝenerala sekretario de UN, Boutros Ghali, konsentas pri la projekto de la usona prezidanto Clinton, peraviadile disjeti helpmaterialon super Bosnio.

24a. La usona ministro pri eksteraj aferoj Christopher vizitas la deportitajn palestinanojn en suda Libano. Diplomatie li montras komprenemon por la vidpunktoj kaj de palestinanoj kaj de Israelo.

25a. En la somalia ĉefurbo Mogadiŝu eksplodas pafado inter UN-trupoj kaj somaliaj armeanoj.

25a. En Kubo okazas unuafoje liberaj elektoj de la membroj de la „politburoo” kaj de la parlamentaj kaj provincaj deputitoj. La ŝtatestro Castro, kiu submetiĝas al la voĉdonado, anoncas ke li antaŭvidas forlasi sian postenon post 5 jaroj.

25a. En suda Koreio enposteniĝas la nova prezidanto Kim Young Sam kiel posteulo de Ro Tae Wu.

26a. La litova prezidanto Brazauskas nomumas la komerciston Slezevicius ĉefministro.

BALENOJ

Kial ‚suicido‘?

En lastaj monatoj dekoj da balenoj aperis mortaj aŭ agoniantaj ĉe marbordoj aŭstral-aziaj. Denove, do, la amaskomunikilaro – ĉar la afero ripe tiĝas – ekparolis pri kolektiva sinmortigado ĉe tiuj mamuloj inteligentaj, kaj iuj ĵurnalistoj sensaciemaj eĉ supozis mistikajn kialojn pro tiu nenormala konduto.

Tamen, surbaze de sciencaj studoj ŝajnas, ke la fenomeno ne estas tiom mistera, eĉ se ne ĉiam oni povas ĝin ekspliki per simplaj klarigoj.

Balenoj estas gregaj bestoj, kaj ĉiu grupo havas unu ‚piloton‘. Se tiu gvidanto surstrandiĝas, tiam la tuta grego povas same suferi. Ankaŭ povas okazi, kaj ĝuste tio ja okazas, ke unu sola gregano surstrandiĝas, nermarkate de la ceteraj. Tial, la ‚mistero‘ estas reduktebla al la demando, kial surstrandiĝas baleno, ĉu aŭ ne ĝi estas piloto.

Laŭ la menciitaj studoj, faritaj de la hispana Instituto Oceanografia, ĉefa kialo estas la perdo de orientiĝo, okazigita ofte pro parazitozo en la interna aŭda organo, aŭ pro ŝtormoj, kiuj perturbas la magnetan kompason de la tero. La interna aŭdilo kune kun ioma kvanto da ferika oksido entenata en la cerbo de la baleno, funkcias kiel kompasilo. Se tiu ‚kompasilo‘ aŭ la magnetika kampo difektiĝas, multaj bestoj, inkluzive balenojn, ne kapablas orientiĝi.

Alia atribuita kialo estas la suferado kaŭzita de grava malsano. Ŝajnas, ke malsama baleno instinkte serĉas akvojn malprofundajn, kaj se la malsano estas tro akuta, tiam la korpo simple drivas. Ambaŭokaze surstrandiĝo estas sekvo tre probable.

Laŭ ekologiistoj, kvankam surstrandiĝo de balenoj estas ja natura fenomeno, okazanta ekde la apero de la specio, tamen nuntempe multobligas la afero pro kaŭzoj nenaturaj. Oni konstatis, ke eksplodegoj de deveno milita aŭ industria (precipe petrolo) rezultigas gravajn magnetajn perturbojn, kaj plie, ke poluado malfortigas la imunecon de balenoj.

Kiam baleno surstrandiĝas, la morto estas preskaŭ neevitebla. Ekster akvo, la grandega pezo de tiaj bestoj povas eĉ subpremi la proprajn internajn organojn, kaj alie la frotado de la korpo kontraŭ la ŝtonoj sekvigas tranĉojn tre facile infekteblajn. Tial, la zorgemo kaj penoj de volontuloj, kiuj

strande provas reenmarigi la balenojn, kutime vanas.

Ĉiuokaze, se oni akceptas, ke balenoj estas bestoj ege inteligentaj, kial ni ne supozu, ke iuj ja sinmortigas por protesti, kiel faras suicide brulanta bonzo? Ĉu ili ne havas sufiĉajn kialojn?

Luiso GILPEREZ FRAILE

DROGOJ

Protektado de *Homo sapiens*

Enketo en Aŭstralio kaj Hindio pri drogoj por malebligi koncipadon, eble helpas savi la endanĝerigitan specion *Homo sapiens* (t.e. la homo). En la hinda urbo Jaipur [Ĝajpur], en la dezerta provinco Raĝastan, senhejmaj hundaĉoj lastatempe multetiĝis, alportante rabion kaj aliajn malsanojn. En la pasinta jaro 100 loĝantoj de Jaipur mortis pro rabio. Oni taksas, ke en tuta Hindio estas pli ol kvar milionoj da senhejmaj hundoj. Aŭstralio spertas similajn problemojn, jen de kunikloj kiuj detruas la herbon, de sovaĝaj hundoj kiuj atakas ŝafojn kaj, pli grave, de katoj kiuj mortigas indiĝenajn bestojn.

Aŭstralia sciencisto, Eddy Stelmasiak, de Instituto pri Animalaj Sciencoj en Melburno, kaj G.P. Talwar, de la Nacia Instituto pri Immunologio en Nov-Delĥio, kune evoluigis novan ĥemiaĵon por malebligi la koncipadon de hundinoj. La drogo, unua sia speco en la mondo, nomiĝas *porcine zona pellucida* (PZP). Ĝi estas pli humana kaj pli sekura ol aliaj ekstermaj metodoj, ĝis nun aplikataj en Hindio, kiel elektrokutado kaj venenado per striknino. Injektita en la in-seksan beston, PZP produktas en la imunsistemo de la besto reagon kiu atakas la diafanan zonon, la substanceton kiu ĉirkaŭas la ovolon en la ovario, kaj malebligas koncipadon. Oni faris la drogon el forĵetaĵoj de buĉejoj. Provoj sukcesis kaj estas neniuj indicoj pri malutilaj flankefikoj.

Kiam la programo komenciĝos, helpos en Jaipur du aŭstralianoj. Por helpi pri la pago de la kostoj, ili serĉas aĉetontojn por sia domo (valoro de 400 000 USD) kaj por sia nova germana aŭtomobilo. Ili ankaŭ serĉas aliajn homamikojn, kaj hundamikojn, kiuj helpe financos la programon. *Helpo en suferado* estas partnerorganizaĵo de la franca Federacio de Junaj Amikoj de la Bestoj.

Ralph HARRY

Poluado en la Nigra Maro

Dum jarcentoj la Nigra Maro produktis delfenajn haŭtojn por ledoj, kaviaron kaj fiŝojn laŭ kvantoj tiom grandaj, ke neniuj kredis, ke tiu abundo povas iam ĉesi. Kaj, tamen, la situacio ŝanĝiĝis. Nun en la Nigra Maro troviĝas toksaj restaĵoj ne nur el ĉiuj industrioj kaj urboj ĉe ĝiaj bordoj, sed ankaŭ aldone el tiuj enfluantaj per pli ol 60 riveroj, trafluantaj tra tersurfaco, kie loĝas sume 160 milionoj da homoj. La plej grandaj el tiuj riveroj – Danubo, Dono, Dnepro kaj Dnestro – trafluas tra regiono agnoskita kiel la plej poluita el la tuta mondo, fonto de tunoj da substancoj toksaj. Ĝuste poluado kune kun ekscesa fiŝkaptado kaj proliferado de la meduzoj, kiuj manĝas la ovojn kaj larvojn de fiŝoj, rezultigis median krizon. El la 26 specoj de fiŝoj kun komerca valoro troveblaj en 1970 restas aktuale en la Nigra Maro nur 5, dum la fokoj tute malaperis. Laŭ biologo Yuvenaly Zaitsev, eĉ se oni mirakle haltigus la malpurigon definitive, tamen, ne eblus reiri al la situacio de la kvindekaj jaroj. „La naturo havas siajn leĝojn”, li avertas.

Gheorghe SALAHURA

Skandala kutimo

Kiam juna paro eliras el la preĝejo post la geedziĝa ceremonio, oni ĵetas sur la novgeedzojn manplenojn da rizo. La kaŭzo estas iu superstiĉo, laŭ kiu tio devus alporti feliĉon al la freŝbakitaj geedzoj. Tio estas verŝajne imito de usona kutimo disvastigita per la kinaj kaj televidaj filmoj el tiu lando.

Se tiuj, kiuj tiel agas, iom pripensus, ili verŝajne komprenus, ke tiu gesto estas kvazaŭ insulto al milionoj da homoj kiuj malsatas, precipe en landoj, kie rizo estas la ĉefa manĝaĵo! Rizo estas por la plimulto da azianoj, kio estas pano por eŭropanoj kaj amerikanoj. En multaj landoj oni respektas panon, kiel simbolon de nutraĵo, sekve de vivo. Kial ne havi la saman respekton al rizo? Oni pensu, ke tiu rizo, kiun oni tiel malŝparas, mankas al malsatantaj infanoj. Ni konsciu pri tio kaj evitu tiun stultan geston! Eĉ se la kvanto da rizo estas malgranda, ni ne plu ĵetu ĝin sur la geedzojn sed pensu pri la tro multaj malsatantoj al kiu tiu varo kruele mankas.

Daniel LUEZ

SPACESPLORADO

Kontribuo de Eŭropo

La 10an kaj 11an de novembro kunsidis en Granada (Hispanio) la ministra konferenco de la Eŭropa Spacagentejo (ESA), batalanta kontraŭ la grava malhelpo de financaj problemoj.

Verdire, post la fuŝa kunsido en Munkeno, la longdaŭra agadplano de la Eŭropa Spacagentejo endanĝeriĝas pli kaj pli, rilate la necesan internacian kunlaboron.

La kunlaboro en la ekstera spaco estas unu el la fundamentaj principoj de la spaca traktato de 1967, kiu agnoskas ke la esploro kaj uzo de tiu spaco devas efektiviĝi laŭ la internacia juro, por gardi la pacon kaj la internacian sekurecon. Tiu internacia kunlaboro efektiviĝas per multflankaj traktatoj, kiuj baziĝas sur la komuna helpo.

La spaca kunlaboro inter eŭropaj landoj komenciĝis en 1962 per du organizaĵoj: la Eŭropa Organizaĵo pri Internaciaj Esploroj (ESRO) kaj la Eŭropa Organizaĵo por la Konstruado de Spacaj Objektoj (ELDO), ĝis kiam en 1971 oni decidis krei ununuran organizaĵon kun ĝeneralaj celoj.

Tiu ESA, kreita per traktato subskribita en Parizo en 1975, nun ligas dek tri membroŝtatojn: Germanion, Belgion, Danion, Francion, Irlandon, Italion, Hispanion, Nederlandon, Brition, Svedion kaj Svislandon, dum Norve-

gio kaj Aŭstrio estas asociaj ŝtatoj, aliĝintaj en 1987. Ankaŭ Finnlando iĝis asocia membro ekde 1987, kaj Kanado, estante ne eŭropa ŝtato, ĝuas specialan statuson kaj partoprenas en multaj programoj.

La celo de tiu agentejo estas la longdaŭra aktivado en eŭropaj spacaj programoj, per rekomendoj al la membroŝtatoj, internaciigante landajn programojn kaj kunordigante ilian agadon kun aliaj organizaĵoj kiuj laboras en la spaca kampo. ESA enhavas kelkajn devigajn agadojn (sciencajn programojn) en kiuj ĉiu membro partoprenas kaj finansas.

Du projektoj kuŝis sur la tablo en la lasta kunsido en Granada: la spaca transportilo *Hermes* kaj konstruado de granda komplekso *Columbus*. Ĉi-lastaj temas pri ambicia orbitanta stacio, konsistonta el tri elementoj: fiksa


laboratorio, liberfluga laboratorio, kaj polusa platformo. La unua estos vera eŭropa kontribuo al la internacia spacostacio *Freedom* (Libereco), kiun estras Usono kaj Japanio, kaj temas pri cilindra ujo, ĉiam ligita al *Freedom*, kaj uzota por esplori la vivkonducojn en mikrogravito.

La liberfluga laboratorio estos kerno de sendependa eŭropa stacio kiu flugos je proksima orbito al tiu de *Freedom* kaj havos la samajn celojn. Fine, la polusa platformo estos nelogata satelito por la studo de atmosferaj fenomenoj, kiu flugos en heliosinkrona orbito je 800 km da distanco.

Fine, ESA planas disvolvoni de spaca raketo, *Ariane V*, lanĉota en 1996. Post multaj duboj, kaj pro financaj problemoj, en Granada oni decidis ke la transportilo *Hermes*, restos netraktita ĝis 1995, dum oni certigis konstruadon de la plej grava projekto *Columbus*, reviziota en la venonta kunsido de 1995, kontraŭ la origina opinio de ESA, kiu planis longdaŭran agadon ĝis la jaro 2000.

M.R. URUEÑA

KOMPLEKSO COLUMBUS



Kocuban Jumeiho en Italio

Kocuban Jumeiho... Eble vi miras aŭdante ĉi tiun nomon. Temas pri orienta speciala terapio. Se al korpulenta viro aŭ virino deziranta maldikiĝi, kuracisto preskribus pli-malpli rigoran dieton, tio verŝajne kaŭzus nenian miron. Kredeble pli strange impresus, se al tiaj pacientoj oni preskribus alĝustigon de la artikoj. Fakte, kredo tion aŭ ne, via eventuala dikeco tre verŝajne dependas de la fakto, ke unu el viaj koksostoj estas delokita. Kaj ne nur dikeco, sed multaj aliaj diversaj misformiĝoj kaj malsanoj povas deveni de neĝusta pozicio de la koksostoj. Bazante sin sur tiu teorio, japana terapiisto Masayuki Saionji de jam multaj jaroj praktikadas en Tokio ĉe sia Internacia Instituto de Preventa Medicino, tute apartan terapion difinitan kiel koksosto-ĝustigan premknedan terapion.

Multaj esperantistoj jam eksciis pri tiu terapio, ĉar antaŭ kelkaj jaroj Saionji faris pri tio prelegojn kaj praktikajn demonstradojn ĉe internaciaj renkontiĝoj kaj universalaj kongresoj. Danke al tiuj demonstraj prelegoj, la afero transiris la limojn de la Esperanto-movado kaj en kelkaj eŭropaj landoj jam funkcias kuraco-centroj, kie oni aplikadas la prem-knedan terapion por alĝustigi delokitajn koksostojn. Tio eblis danke la helpemon de multnombraj esperantistoj en diversaj landoj, precipe eŭropaj, sed antaŭ ĉio danke al la senlaca persona disvastiga laboro de la japana majstro, kiu per konvinkaj argumentoj kaj demonstradoj tion diskonigis.

Nu, kiel rezulto de tiu vasta informagado, en la urbo Nuoro, en la insulo Sardinio (Italio) okazis tritaga prezentado de la speciala orienta terapio en salonego de la loka komerco. Partoprenis centoj da interesitaj homoj, inter ili multaj fizioterapiistoj, de diversaj fakoj, kuracistoj; sed antaŭ ĉio simplaj homoj kaj virinoj kun siaj infanoj.

Menciindas, ke de tago al tago pli kaj pli kreskis la ĝenerala intereso kaj la respektplena spektado de la prelego kaj demonstrado de la japana majstro.

La homa korpo ja bezonas stabilecon, la homa korpo ja bezonas simetrian lokiĝon de la ostoj, kaj se la



Saionji Masayuki dum sia laboro en Italio.

bazo de la korpo ne estas stabila, kiel povas ĉio de ĝi subtenata bone funkcii? De la delokiĝo de la koksostoj devenas praktike ĉiuj malsanoj. Tion asertas Saionji Masayuki.

Dum la tri tagoj prezentiĝis diversaj kazoj: plenaĝuloj, infanoj, sportistoj, fakuloj, kaj ĉiuj kiuj deziris esti traktataj per la speciala terapio. Jen patrino kun sia 11jara infano, knabino kun grava skoliozo, kun astmo, kiu prezentas la knabinon iomete timeman en la komenco, sed tuj trankviligita de la milda rideto de la masaĝisto.

Jen ŝi kuŝanta sur matraceto en la mezo de tiu ĉi granda salono en ĉesto de tiom da personoj, jen la majstro kliniĝas, tuŝas ŝian etan korpon, movas ŝiajn artikojn, tuŝas la strategiajn punktojn, kaj finfine post la traktado jen la knabino, kiu levigis sendolora. La sekvan tagon ŝi revenas kun sia panjo kaj asertas, ke ŝi dormis trankvile la tutan nokton.

Kion diri pri alia knabino, la 9jara Katerina, kiu ankaŭ havis gravan misformiĝon de la spino, kaj ankaŭ ĉe la maleol-artiko havis gravajn problemojn.

Certe unu nura traktado ne povas solvi ĉiujn problemojn, tamen ĝi ĉiam estas kontentiga.

Kaj ni pasu al plenaĝuloj. S-ro Deplano, 35jara, kiu havis lezon ĉe la genuo kaj ankaŭ fortan doloron ĉe la femuro pro kontuzo kaj rigideco ĝenerala en la tuta muskolaro. La majstro konstatis, ke li havas delokiĝon de la dekstra koksosto je unu centimetro. Jen post la kuracado, ankaŭ li leviĝas de la matraceto tute renovigita. Kaj tio ne estas ĉio.

Dum la tagoj pasis, kelkaj kuracistoj kun granda intereso kaj respekto, aŭskultis kaj interesiĝis pri ĉiuj detaloj de la nova japana masaĝmaniero.

Finfine, ankaŭ ili petis ke la majstro traktu ilin. Ĉe la fino estis nur laŭdoj por la terapiisto.

Massidda ANTONIETTA

Pri la terapio ekzistas libro en Esperanto: „Orienta speciala diina masaĝo”. Ĝi estas akirebla ĉe FEL kontraŭ 631 BEF + afranko.

Kormalsano – ne nur por riĉuloj

La nombro da irananoj suferantaj pro kormalsanoj daŭre pliiĝas. Dum en 1980 ĉ. 37 % de ĉiuj mortintoj estis kormalsanuloj, en 1990 la proporcio atingis 58 %, kaj la nombro de mortintoj pro kormalsanoj en Irano kreskis al 150 000 jare.

Laŭ la averto de la ministro pri sano, kuracado kaj instruado pri la medicino, anstataŭ agi efike por halti la plialtiĝon de kormalsanoj, en Irano oni nur klopodas rilate la flegadon de tiaj malsanuloj.

La ĉi-jara devizo de la Monda Organizaĵo pri Sano temas pri regulaj batoj de la koro; sed ĉiujare mortas tutmonde ĉ. 12 milionoj da homoj pro kormalsanoj. Krome, multaj aliaj homoj suferadas pro la koro. Antaŭe, oni supozis, ke kormalsanoj okazas ĉefe en la industriaj landoj, sed nuntempe, pro zorga kontrolado kaj efikaj rimedoj en tiuj landoj, la nombro de kormalsanuloj tre malaltiĝis. Male, en la evoluantaj landoj, la nombro plialtiĝis. Aktuale la reŭmatoida febro, kiu atakas la muskolojn de la koro, epidemias en la evoluantaj landoj.

Nezorgemo pri la dieto, fumado, diabeto, hipertensio, troa uzo de salo kaj de alkoholaĵoj rangas inter la kaŭzoj de kormalsanoj en la evoluantaj landoj.

Mohamad KARAMUDINI

SOCIO

La knabino Maŭgli

Probable oni aŭdis pri la infano Maŭgli kiu, laŭ la romano *Jungle Book* de la brita verkisto Rudyard Kipling [Redjd Keplng], elkreskis kaj edukiĝis inter sovaĝaj bestoj. Fojfoje similaj eventoj okazas en reala vivo en nia tempo.

Jen preskaŭ dum 12 jaroj, ekde sia naskiĝo, estis vivinta, plejparte en ligna kesto iom pli ol duonmetron longa, Maŝa Miĥalicina, eksa loĝantino de vilaĝo nord-oriente de Moskvo. Oni trovis la malfeliĉan knabinon tute hazarde, post la subita morto de ŝia patrino. En la domo, plenuminte la formalajojn pri la mortintino, oni rimarkis sur forno kurtenon kiu moviĝis. Forŝovinte tiun kurtenon, oni vidis duonnudan knabinon en kamizolo sen manikoj, malpuran, kun hirtigitaj haroj kaj timigitaj okuletoj.



Maŝa (dekstre) jam forĝesis sian sortobaton kaj ludas "filinon-patrinon". (Foto: TASS)

Oni provis alproksimiĝi al ŝi, sed ŝi sovaĝe ekkriis kaj rapide engrimpis apude starantan keston, kies kovrilon ŝi fermis, permesante al neniu tuŝi ŝin. Reage al ĉiu tia provo, ŝi nur kriegis kaj gratvundis. Nur post iom da tempo, laboristinoj de loka infanĝardeno sukcesis liberigi la knabinon el ŝia kesta izoliteco. Plej mirige estas, ke neniu el la vilaĝanoj, eĉ la plej proksimaj najbaroj suspektis ion pri ŝia ekzisto, kaj la enigmon, pro kio estis necese dumvive enkarcerigi la infanon en tiu ligna kriptoj, la patrino forportis kun si en la tombejon.

La knabino mem ankoraŭ devis konatiĝi kun la ekstera mondo. Oni veturigis ŝin en lokan psikoneŭrologian instituton. Poiomete la knabino revenis al vivo, superante etapojn de evoluo, kiujn normalaj geknaboj transiras maksimume je 4-5-jara aĝo. Tamen la fakuloj ne nur ekinteresiĝis pri tiu escepta kazo, kiu liveris eblecon pri ĉiuflankaj esploroj, sed ankaŭ provegas plej rapide kaj efike forigi la negativajn postsekvojn de ŝia kompleta izoliteco kaj malfeliĉega vivo.

NikSt

BESTO-KRUELECO

Sadisto en la stalo

Maniulo – tiel konjektas polico – sadismas kontraŭ ĉevaloj en sud-angla regiono Hampshire [Hempŝr]. Ene de du jaroj okazis 31 atencoj, kiuj perpleksigas policon kaj konsternas ĉevalposedantojn. Pro plej lasta atako mortis dekjaraĝa ĉevalo, dumnokte en sia stalo brutale hakita ĉirkaŭ kolo kaj postaĵo. La atenco – seks-motivo ne elstrekiĝas – instigis al pli intensaj, sed ĝis nun vanaj, enketoj. Pro rekompenco-promeso (18 000 britaj pundoj) riceviĝis de polico 900 telefonvokoj, kaj publikiĝis bildo de eventuala atakinto – tamen neniu arestiĝis. Laŭ psikologo, la atencinto devas esti iu, supozeble viro, mense malsana, kiu ĉevalojn komprenas, ne timas, kaj ial abomenas. De tempo al tempo okazas kontraŭ-ĉevalaj atakoj: en Usono, ekzemple, ekzistis kulto dediĉita al rita buĉado de ĉevaloj, kaj en Anglio en 1903 fifamiĝis pastro – poste senkulpigita – pro atencoj kontraŭ ĉevaloj, bovoj kaj ŝafoj. Ŝajnas, tamen, ke la nunaj atakoj en Anglio rezultiĝas de perverseco, eventuale perversio, de unuopa maniulo. Paŭlo GUBBINS

JAPANIO

Ne nur laborego...

Antaŭ iom pli ol cent jaroj, Japanio estis lando vivanta sian propran, modestan kaj fermitan vivon, konata nur al unuopaj ekstravagancaj vojaĝantoj. Post la Dua Mondmilito, ĝi fariĝis fama ĉie en la mondo, sed ĝenerale oni scias nenion pri la prezo, kiun japanoj devas pagi por sia sukceso.

La averaĝa nombro de laborhoroj en la jaro 1989 estis 2159, kompare kun 1957 en Usono, 1989 en Britio kaj 1638 en Germanio. En 1988 la laborsemajno mallongiĝis de 48 horoj ĝis 40, sed ĝis nun la plimulto de laboristoj superas je 14-15 horoj la oficialan normon. La problemoj pri labortempo super tolereblaj limoj, ne estas facile solvebla. Do tiun ĉi landon tuŝas fenomeno nenie alilande konata, nome mortoj pro laborlaceco. Fakuloj prognozas, ke ĉiu deka mortonto en 1992 forpasos pro tiu ĉi kaŭzo.

Tamen, laĉaj japanoj scipovas ŝerci pri sia laceco kaj flankenmeti ĉiujn problemojn, kiam la kalendaro montras, ke iu festo estas baldaŭ okazonta. Kaj festoj, kiuj perdis nenion el sia tradicieco, kaj kies profundan sencon povas kompreni nur japannaskitoj, buntas kaj abundas.

Unu el tiuj estas la *onhaŝira matsuri*, kiu okazas ĉiun sesan jaron. *Onaŝira* signifas sankta kolono, t.e. arbo kiun oni transportas de monto al korto de sanktejo en la regiono Nagano, kie oni starigos ĝin por la sekvantaj ses jaroj. La „transporto” estas dividita en kvar fazoj; en ĉiu fazo anticipe elektitaj personoj havas grandan honoron sidi sur la trunko de la arbo, kiun oni fakte ne portas sed igas rapide glitadi malsupren laŭ la deklivo.


Impone danĝera

La plej impona, vidinda kaj danĝera parto de la festo estas do la rajdado sur la trunko, por ĝin stiri kvazaŭ ĉevalon. Ĉi-jare unu persono mortis kaj kelkdek aliaj vundiĝis. Esti elektita por gvidi la „kolonon” signifas ne nur grandan honoron personan kaj familian, sed ankaŭ bonfarton kaj feliĉon por la estonteco. Tamen, rigardante la spektaklon, mia okjaraĝa filo kun klare videbla timo en la okuloj, demandis ĉu li ankaŭ devos partopreni la feston, kiam li estos plenkreskulo...

Judita YAMATO

Teatro-fenikso en Londono

Rekonstruiĝas en la brita ĉefurbo Londono la fama 'Globo'-teatro, kie unuafoje prezentigis teatraĵoj de la angla dramatiso Ŝekspiro. La originala 'Globo' konstruiĝis en 1599, forbruliĝis en 1613, estis rekonstruita sed finfine detruita en 1644



Kiel rekonstruiĝas la Ŝekspira 'Globo'-teatro (el The Observer, Londono).

de membroj de strikta puritana sekto. La nova 'Globo', starigota kelkcent metrojn for de ĝia originala loko, estas koncipita de la usona filmreĝisoro Sam Wanamaker [Ŭanama-ka], kiu ĉi-monate malkaŝos al historiistoj kaj arkitektoj du tri-etaĝajn flankojn de planita 20-flanka teatro. Se la spertuloj aplaŭdas la el kverko, kaj laŭ tradiciaj, 17-jarcentaj konstru-metodoj faritan teatro-dekonon, Wanamaker esperas financi — ĝis 3 milionoj da britaj pundoj — la ceterajn naŭ dekonon. Tiam, se ĉio laŭplanos, la 1500-sidloka teatro malfermiĝos en aprilo 1994 — 430 jarojn post Ŝekspiro-naskiĝo kaj 350 jarojn post detruo de la originala 'Globo'.

Paŭlo GUBBINS

Alp-tuneloj: jes!

En septembro 1992 okazis en Svislando referendumo pri du novaj fervojaj tuneloj tra Alpoj. Per 63 % da „jes-voĉoj” la svisoj voĉdonis por la plano. Celo estas, ke la var-trafiko inter la nordaj eŭropaj landoj kaj Italio tra Alpoj okazu per fervojo, por malŝarĝi la ŝoseojn kaj protekti la pejzaĝon.

Por realigi tion, oni konstruos du novajn tunelojn; la unuan inter Bern kaj Brig, kun longeco de 28 km, la duan sub Gotthard-masivo inter Zuriko (Zürich) kaj Milano, kun longeco de 50 km. La kostoj estas provizore taksitaj je 15 miliardoj da frankoj svisaj. Tiu giganta investo certigos dum longa tempo multajn laborlokojn, sole ĉirkaŭ 9000 por la surlokaj konstrulaboroj.

Joachim GIESSNER

AŬSTRIO

Plukebla poezio

Staras en la Karintia Strato de Vieno juna tilio, ĉirkaŭvolvita per glustrioj kun ties glua flanko ekstere. Surglunitaj estas paperetoj kun verkoj de la viena poeto Helmut Seethaler [Setaler]. Kiam li estis 17jara, li eldonis unu volumon kun siaj poemoj, sed sen sukcese. Tial li decidis praktiki tiun



Kärntnerstraßentext 107
So geht man durch diese Straße auf der Suche nach neuen Menschen und findet oft solche, die ebenso auf der Suche sind und so vollendet sich das Suchen, indem man selber gefunden wird.

Plukebla poezio kun specimeno

rektan reklamadon, kaj ĝis nun surpaperigis 11 000 poemojn.


Tia afiŝado estas malpermesita en Vieno kaj Seethaler jam dudekfoje estis kondamnita. Finfine oni tamen agnoskis lian agadon kaj disponigis al li lokojn por liaj verkoj.

Jen ekzemplo de Seethaler-poemo, tradukita el la germana:

*Tiel oni iras tra tiu strato
serĉante novajn homojn
kaj ofte trovas tiajn,
kiuj same serĉas
kaj tiel plenumiĝas la serĉado
ke oni mem estas trovita.*

Flanke de la poemoj tekstas: „Pliajn tekstojn kontraŭ eta monbileto ĉe Helmut Seethaler, Wasnergasse 43/8, A-1200 Wien”.

Walter KLAG



Precipe en malriĉaj landoj infanlaboro estas ĝenerala kutimo. Infanoj ekzemple devas labori kiel portistoj, tapiŝfaristoj kaj ministoj. Multaj infanoj pro tio ne nur devas rezigni pri lernejo, sed ankaŭ malsaniĝas pro tro streĉaj laboroj, kiuj superas iliajn fortojn.

Ĉu eskapo el la ekonomio?

Estas klare, ke la mondo bezonas novan ekonomian sistemon, kaj nacian kaj internacian. Oni pripensu nur kelkajn el la multegaj sekvoj de la ekzistanta sistemo:

1) La natura medio estas konstanta viktimo de ekonomiaj postuloj, eĉ kiam la damaĝoj estas okulfrapaj.

2) La plimulto de la homoj vivas en malriĉeco, regataj de decidoj de malproksimaj manipulantoj.

3) Eĉ pli riĉaj homoj devas lukti en sistemo karakterizata per nestabileco, konkurenco, manko de homa solidareco kaj de konscio pri la natura medio.

4) Ofte estas laboro farinda/farenda kaj homoj laborpretaj, sed pro manko de mono oni ne laboras; senlaboreco estas nun grava mondskala problemo; aliflanke estas farata multe da senutila laboro, kiu celas nur monan profiton.

Naciaj registaroj konscias pri tiaj problemoj, sed malofte povas ion fari. Ĉiuokaze ilia plej nobla celo estas, ke la propra lando kiel eble plej profitu el la sistemo. Tiu malnova naciismo ne akordas kun la kreskanta konsciigo pri la minacoj al nia komuna planedo. Ekzistas supernaciaj ekonomiaj organizaĵoj, kies laŭnoma celo estas helpi laŭ planeda skalo, ekz. Internacia Mona Fonduso kaj Monda Banko. Sed kritikantoj atentigas, ke tiuj IMF kaj MB ofte atingas pli akutan krizon en malriĉaj landoj kaj ekologiajn katastrofojn. La plej akra kritiko estas, ke IMF kaj MB estas partoj de la problemo, ne de la solvo. Eĉ milionuloj estas dependaj de ofte ne antaŭvideblaj cirkonstancoj; neniu povas decidi sian ekonomian sorton.

Ĉu estas ia alternativo al tiu giganta reto de dependecoj? La respondo ŝajnas esti, ke jes. Unua ebla solvo estas ankoraŭ en embria formo, sed eksperimentoj ĝis nun donas esperon. La alternativa sistemo estas nomata anglalingve *LETS (Local Exchange Trading System)*, por kiu mi proponas en nia lingvo la formon LIS (Loka Interŝanĝa Sistemo). Ĝi estis lanĉita en 1982 en la kanada urbo Courtenay (en brita Kolumbio) de Michael [Majkl] Linton.

Neniu ĝisfunde komprenas la nunan sistemon – ankaŭ ekonomikistoj ne!

Kontraŭe LIS estas koncepte ege simpla, kaj unue novulo emas suspekti, ke devas esti mankoj en ĝi. Sed ĝis nun neniu trovis tian eventualan mankon, kaj la sistemo do funkcias bone en la mallarĝa kadro, en kiu oni ĝin elprovas.

Sur la baza nivelo LIS funkcias en geografie malgranda (loka) homa grupo. Ĝi uzas sistemon de „poentoj” (aŭ „verdaj dolaroj” – la nomo varias) anstataŭ la nacian valuton, sed en komenca etapo eble necesas kombini la du „pagilojn”. Membro pagas malgrandan aliĝkotizon kaj sciigas al la „centro” (kutime unu persono kun komputilo, sed kajero sufiĉas), kiajn servojn aŭ produktojn li/ŝi povas proponi. La membro rajtas konsulti tiun centran informejon por scii, kiu el la aliaj membroj proponas kion kaj ankaŭ la staton de la konto de iu ajn eventuala negockunulo.

Ni diru, ekzemple, ke Petro, elektristo, bezonas riparon de mebloj. Li informiĝas, ke Tomaso povas fari tion, sed Tomaso tiumomente ne bezonas la helpon de elektristo. Ili povas tamen interkonsenti, ke Tomaso ricevos de la LIS-sistemo x poentojn pro la riparo; Petro tiam ŝuldas x poentojn al la sistemo. Eble Jana deziras, ke Petro riparu ŝian fridujon, sed ŝi ne kapablas proponi ion bezonatan de Petro. Ne gravas, se ili interkonsentas ke Petro ricevos poentojn, dum Jana ŝuldos – eble ŝi povos okaze ion triki por Tomaso.

Konvencia mono do ne nepras. Oni povas ricevi servon aŭ produkton „kredite”, ĉar la ŝuldo estas al la tuta LIS-sistemo, ne al individua membro. Alia grava fakto: nek al ŝuldoj nek al kredito aldoniĝas interezoj. Ĉiu komence havas nulan konton, kaj rajtas dum limigita periodo ŝuldi ion. Sed eĉ pli ol en la normala ekonomia sistemo estas malkonsilinde esti daŭra ŝuldanto ĉar ĉiu membro rajtas iam ajn scii pri la stato de ies ajn konto. La sistemo entute devas ĉiam havi ekvilibron inter ŝuldoj kaj kreditoj, do nulan konton.

Jen la loka bazo de la sistemo. Sed antaŭvidate estas, ke iam lokaj grupoj formos reton, eble naciskale (se nacioj restos kiel la ĉefaj politikaj unuoj). Emfazendas tamen, ke la nacia reto

provizos nur tiujn varojn kaj servojn, kiuj ne estas haveblaj en la loka. Simile ekzistos internaciaj retoj el tiuj naciaj: internacia komercado provizos nur tion, kion oni ne povas ricevi per la loka aŭ nacia grupo. La loka grupo estas do la plej grava en la ĉiutaga vivo. Tio profunde diferencas de la nuna sistemo.

Ĉu do internacia komercado grandege malpliigos? Jes. Ĉu la malriĉaj landoj ne plu ricevos helpon de la riĉaj? Unua respondo: ĉu la nuna helpo donata de bankoj de riĉaj landoj vere profitas al tiuj malriĉaj?

Sed kompreneble estos tre grava problemo ankaŭ tiam, se LIS iĝos universala, kiel la pli riĉaj homoj povos helpi al malriĉaj. Jen nur krokizaj ideoj: eĉ Etiopio kaj Somalio povus sin nutri, se la homoj povus tie koncentri sian laboron pri kreskigo kaj produktado de manĝaĵoj, kaj ne de eksportvaroj. Alia penso: se la strukturoj de la ekonomia (kaj sekve ankaŭ politika) vivo ŝanĝiĝos tiel, ke plej gravos la loka grupo, en kiu senlaboreco apenaŭ rolas kaj la pure mongajna motivo malmulte gravas, eble malaperos multaj timoj, kiuj regas en la nuna sistemo (pri senlaboreco, pri malriĉiĝo, pri konkurenco, pri la ekonomia forto de aliaj landoj). Kaj homoj sen timoj kredeble multe pli bone helpos aliajn ol la nunaj prestiĝosopiraj registaroj kaj monakiremaj bankoj.

Unu ebla miskompreno pri LIS estas la jena: grupo bezonas kreditan saldon por financi socialajn servojn, aĉeton de varoj ne haveblaj surloke, ktp., kaj nula konto ne permesas tion. La respondo estas, ke kiam LIS estos la sola ekonomia sistemo, impostoj funkcios pli-malpli same kiel en aliaj sistemoj. Ni ne forgesu, ke ekzistantaj valutoj same kiel „verdaj dolaroj” estas fikciaĵoj, estas nerealaĵoj, kiujn oni uzas por akiri realajn objektojn. Necesas nur ke oni fidu je la interŝanĝa valoro de la fikciaĵo. Ni do povas krei per interkonsento tiun „monon”.

Sed kio pri homo, kiu deziras vojaĝi ekster la limojn de sia loka grupo? Dume necesos uzi la ekzistantan monsystemon, sed se LIS universaligos, oni devus aranĝi interkonsentojn inter naciaj kaj internaciaj retoj.

Inter la avantaĝoj de LIS estas: ➤

Reklami pri praktikaj aplikoj

Michel Basso estas juna direktoro de konstruentrepreno en Elzaco (Francio). Li uzas Esperanton kiel laborlingvon en sia entrepreno. MONATO vizitis lin.

MONATO: Kiam kaj kial vi decidis lerni Esperanton?

BASSO: Ĉiam mi opiniis, ke komuna internacia lingvo estas necesa por la internaciaj rilatoj. Ĉar Esperanto estas la plej facila vivanta lingvo kaj ĉar ĉiuj parolantoj bezonis kvazaŭ la saman penon por ĝin lerni, ĝi estas la plej justa kaj efika solvo. Mi estis dekkvinjara, kiam mi eklernis ĝin.

MONATO: Kie vi lernis la lingvon?

BASSO: Mi sekvis kurson en la liceo de mia instruisto pri la germana en Münster. Mi skribis mian unuan leteron al korespondanto en Sovetio post du monatoj da lernado.

MONATO: Vi estras konstru-entreprenon kaj Esperanto iĝis por vi laborlingvo. Kiel, praktike, vi uzas Esperanton?

BASSO: Tre malfacilas trovi kvalifikitajn laboristojn pri la konstruaj metioj en Francio. Danke al la Esperanto-gazetaro mi povis dungigi laboristojn el Pollando, Bulgario kaj Litovio kaj nia komunikilo sur la konstruejoj estas Esperanto. Unu el ili, bulgario, apenaŭ parolis Esperanton kiam li alvenis. Post unu jaro li parolis ĝin bone kaj eĉ elturniĝis en la franca. Bedaŭrinde li ne rajtis resti pli longe en Francio.

MONATO: Ĉu vi rilatas kun eksterlandaj entreprenoj?

BASSO: Mi estas membro de Internacia Ekonomia kaj Komerca Fakgrupo (IKEF), kiu arigas komercistojn el la tuta mondo. La asocio eldonas jarlibron de entreprenoj kaj bultenon. Esperantistaj entreprenoj nun ankaŭ reklamas per fakso. Alvenas tiaj tre ofte el orienta Eŭropo kaj eĉ el Usono. Danke al tiu jarlibro kaj la jarlibro de UEA, mi trovis la adreson de germana asekuristo por miaj konstruejoj en Germanio. La aferon ni pritraktis nur en Esperanto. Baldaŭ mi intencas krei internacian asocion de konstruistoj: Tutmondan Asocion de Konstruistoj Esperantistaj. Cento da profesiuloj jam sin anoncis. Miaj kontaktoj kun eksterlando jam ege utilas al mi, ĉar Esperanto rolas kiel ponto-lingvo por tradukado. Se mi bezonas skribi leteron al hungara entrepreno aŭ oficialan leteron en la hungara, mi faksas al hungara esperantisto, kiu resendas al mi la hungarlingvan tradukon eĉ la saman tagon. Mia revo estas la jena: baldaŭ havi la eblecon trovi en aliaj eŭropaj landoj junajn faklernantojn, kiujn mi ne plu trovas en mia lando. Ili povus do lerni metion en pluraj landoj kaj sperti novajn labormetodojn. Esperanto do povus iĝi la lingvo de laboristoj vojaĝantaj tra Eŭropo! Malnova tradicio, sed kun pluso en la komunikado: internacia lingvo!

MONATO Kion opinias viaj neesperantistaj samprofesiuloj?

BASSO: La junaj kolegoj kutime ne konas Esperanton, iuj jam aŭdis pri ĝi, sed ne konas la praktikajn aplikojn. Tion mi montras al ili. Mi esperas, ke la esperantistaro komprenos, ke paralele al nia 'ideologio', ni devas reklami pri la praktikaj aplikoj de Esperanto kaj pruvi, ke ĝia kono ebligas ankaŭ akiradon de pli da mono. Tion mi deziras montri.

Edmond LUDWIG

1) Ĝi dependas ne de la nestabila en-kaj el-fluo de mono, sed de la energio kaj rimedoj de la loka grupo, kion la lokaj homoj povas regi, kaj tiel ĝi povus grandparte forigi senlaborecon.

2) LIS povas kontribui al formiĝo de pli bonaj rilatoj en la loka grupo; ĝi koncentras la atenton al tiu grupo, al kunlaboro en la komuna sistemo anstataŭ konkurenco.

3) Ĝi simpligas kaj igas malpli kostaj ekonomiajn interrilatojn; ne bezonataj estas bankoj kaj aliaj institucioj, kies ekzistokialo estas preni profiton kiel 'peristoj' sen vera kontribuo al produktado de varoj.

4) Ĝi preskaŭ forigas la profitmotivon kiel la ĉefan katalizilon de ekonomia agado; pli gravas veraj bezonoj. Ankaŭ fraŭduloj ne prosperas en ĝi, ĉar ilia konto estas ĉiam videbla. Se iu decidas 'malaperi', ŝuldante al la sistemo, tiu ricevas reputacion de nefidindulo, kio malebligas pluan fraŭdadon.

5) Ĝi povus stimuli lokan produktadon kaj malpliigi la neracian transportadon de varoj, kiu estigas grandajn kostojn kaj polucion.

6) Ĉefe en malriĉaj landoj ĝi grandparte liberigus el la katenoj de la monda merkato kaj savus la naturan medion, kiun oni ofte 'oferas' por repagi interezojn de pruntmono.

7) LIS estas grava, eble nepra paŝo al malcentralizado de la politiko kaj ekonomio, sed ne kontraŭbatalas tutmondan perspektivon kaj do kontribuas al la sinteno „pensi tutglobe, agi surloke”.


8) Ĉar loka grupo rangas antaŭ la nacia, supozeble oni ne plu okupiĝos pri tiuj grandskalaj projektoj, kiuj profitas al neniuj, ekzemple naciaj 'defendosistemoj’.

La baroj al disvastiĝo de LIS nuntempe estas unue la evidenta, ke ĝi estas tiel nova, ke nemultaj homoj scias pri ĝi. Estas ankaŭ homoj, kiuj iom studis la ideon sed ne fidis ĝin, ĉar ĝi tro diferencas de la konvencia ekonomiko. Kaj eĉ inter uzantoj de la sistemo estas sento, ke grupo iĝas vivkapabla nur, se aliĝas al ĝi sufiĉe da homoj proponantaj diversajn servojn kaj varojn.

Kvankam LIS estus speciale utila en ekonomie baraktantaj landoj, kiaj en orienta Eŭropo, ĝis nun ĝi funkcias ŝajne nur en anglalingvaj landoj: Kanado, Usono, Britio, Nov-Zelando kaj Aŭstralio, kaj eĉ tie nur inter ankoraŭ relative malgrandaj grupoj.

Tiuj, kiuj deziras pli da informoj, povas kontakti *Landsman Community Services Ltd*, 375 Johnson Avenue, Courtenay, British Columbia V9V 2Y2, Kanado.

Trevor STEELE



La rusa

РУССКИЙ



La rusa estas la lingvo de unu el la plej grandaj landoj en la mondo (kaj iam la oficiala lingvo de eks-Sovetio). Ĝi estas unu el la kelkaj plej parolataj lingvoj en la mondo (289 milionoj da parolantoj), eĉ se nur en unu parto de ĝi. Sed ĝi estas regresante je la momento, unue en orienta Eŭropo kie ĝi estis deviga studobjekto (sed, pro la sovetia politika hegemonio, ne tro populara), kaj due en la eksaj SSROj de Sovetio, por kies registaro ĝi estis la lig-lingvo inter la diversaj naciecoj (ignorante ke la rusa ne povis esti neŭtrala interlingvo, pro la superrego de la rusoj mem). Sed la lingvo de tiel granda nacio certe restos gravega. (Oni publikigas en ĝi pli da sciencaĵoj ol en iu alia lingvo krom la angla.) Certe ĝi denove pligraviĝos, kiam la rusoj solvos la nunajn ekonomiajn problemojn. Krome, pro ĝia simileco al preskaŭ ĉiuj orient-eŭropaj lingvoj (belorusa, ukraina, pola, ĉeĥa, slovena, serbkroata, bulgara, k.s.) estas facile al rusparolanto lerni ilin, aŭ foje eĉ kompreni ilin seninstrue.

La problemo estas unue lerni la rusan, ĉar ĝi havas reputacion esti tre malfacila por ne-slavoj. (Oni devas memori, ke neniu lingvo estas malfacila por denaskaj parolantoj.)

La unua timigo por eksterlandano estas la cirila alfabeto, sed en vero ĝi estas tre facile lernebla, kaj taŭgas por la lingvo pro sia koncizeco

(la sonon ŝĉ, kiun la rusoj skribas unu-litere Ш, la poloj devas skribi latine per kvar: szcz, kiel el la urbo Bydgoszcz). Bedaŭrinde, iuj cirilaj literoj aspektas tro similaj unu al la alia: М, И, Н, П, Ц, Ш, Щ; Ч, У; Б, В, Ъ, Ь; Х, Ж – eĉ pli multaj similas en manskribo – kio malfaciligas legadon. Per la rusa alfabeto oni povas elparoli la lingvon sufiĉe precize. Ĉefe unu eco malhelpas la studadon. Kiel en la angla, estas forta vortemfazo; vokaloj grande ŝanĝiĝas prononce kiam ili troviĝas en malfaza pozicio. Sed la loko de la emfazata silabo estas ŝanĝiĝema, eĉ por la sama vorto en diversaj funkcioj, malsame al ekzemple la pola (kie ĝi estas ĉiam antaŭlasta) aŭ ĉeĥa (ĉiam unua). Kaj la skribo ne indikas la emfazon. Alie la lingvo estus facile eldirebla.

Tiam oni komencas studi la gramatikon, kiu estas la vera malfacilaĵo por preskaŭ ĉiuj lernantoj. Estas iuj facilaj ecoj: ne estas artikoloj (*la*), kaj *esti* ne uzatas en la prezenco.

Kiel la germana ĝi havas tri gramatikajn genrojn (virgenra, ingenra kaj neŭtra), sed malsame al ĉi tiu estas facile antaŭdiri la genron de nekonsiderata vorto pro la distingaj finaĵoj (ĝe-

nerale: V: iun konsanton; I: -a /a/; N: -o /o/). Similajn finaĵojn ĝi utiligas ne nur por substantivoj, sed ankaŭ por adjektivoj, pronomoj kaj la preterito de verboj.

Sed tiu nominativo estas nur unu el la ses kazoj, kiujn la rusa retenas (el la ok en la origina hind-eŭropa lingvo). La aliaj anstataŭas prepoziciojn en Esperanto, (ekzemple genitivo: *de*; dativo: *al*; instrumentalo: *per*; lokativo: *ĉe*) kaj la finaĵon *-n* (akuzativo). Rusaj vortoj estas kameleonoj kiuj konstante ŝanĝas siajn kolorojn (per finaĵoj) laŭ siaj medioj. Substantivoj kaj pronomoj ŝanĝiĝas ne nur laŭ nombro (singularo/pluralo) sed ankaŭ kazo, kaj adjektivoj devas akordiĝi kun siaj substantivoj laŭ nombro, kazo kaj genro. Eĉ numeraloj devas akordiĝi laŭ kazo. Substantivo post la numeraloj 2-4 devas esti en singulara (!) genitivo, kaj 5 aŭ pli granda en plurala genitivo.

Entute la studanto devas lerni tre grandan kvanton da finaĵoj, kio eble ŝajnos sence kiam la tempo povus uziĝi por lerni novajn vortojn. Eble ŝi/li ankaŭ miros, alveninte en Moskvon, ke la rusoj mem ne ĉiam portas deklinacitabelon por kaŝe studi, eĉ se ili forgesus ĝustan fin-

Por ĉiuj estas unu formo kiu signifas unudirektan moviĝon, kaj alia kiu signifas „tien kaj reen”. Ili ankaŭ havas perfektivan („finitan”) formon, kaj al ĉiuj povas aldoni multaj prefiksoj, kiuj donas detalajn nuancojn, ekzemple en-, el-, al-, for-, trans-, tra- iri.

Unu eco kiu ŝajnas tipe rusa estas la ŝato por nepersonaj esprimoj, kie (almenaŭ gramatike) la subjekto ne mem agas sed estas influata de eksteraj kondiĉoj. Oni diras ne nur *мне холодно* [mnje ĥoladna] „al mi malvarmas”, *мне правится* [mnje pravitsa] „al mi plaĉas”, sed eĉ *мамы дома не было* [mami doma ne bila], laŭvorte „dome ne estis de panjo” = „panjo ne estis dome”. Ne ekzistas vorto por Esperanta *havi* – oni diras ekzemple *у меня нет...* [u minja net] „ĉe mi ne {estas}”, por „mi ne havas”. Eble la plej rusa vorto el ĉiuj estas *нельзя* [nilzja]: „malpermesatas, maleblas, oni ne devas”, kiu havas profundan sencon de senpoveco kaj rezignacio fronte al naturaj (aŭ burokrataj) kondiĉoj.

Nomoj iĝas alia malgranda problemo, kiel atestos eksterlandaj legintoj de romanoj kiel „*Milito kaj la Mondo*” de Tolsoj. Rusoj havas person-, patro- kaj famili-nomon, kaj kutime uzas la personomon kaj patronomon, kiujn oni devas memori. Plue, la personomo povas havi nekredoblan gamon da belegaj diminutivoj: ekzemple *Александр* [Alikstrandr] iĝas *Саша* [Saŝa] aŭ *Шура* [Ŝura]; *Екатерина* [Ekatirina] iĝas *Катя* [Katja] aŭ *Катюшка* [Katjuŝka].

Kvankam estas pruntvortoj en la rusa, la plejparto de la vortprovizo probable aspektas malkonate al la eksterlandano. Ofte ili fakte estas prunttradukoj, ekz. *между / народ / ный* [meĵdu / narod / nij] = „inter/naci/a”; *со / врем / енный* [sa / vrem / inij] kun/temp/a = „nuntempa”.

Multaj vortoj estas por nerusoj iom malfacile prononceblaj, ĉu pro long-



eco ĉu pro komplikaj kombinaĵoj de konsonantoj, aŭ ambaŭ; de *В* [v] = „en” al *головокружительная* [galavakruĵitilnaja], vorto kiu signifas „spirŝtela” (kaj mem estas tia!), aŭ *взгляд* [vzgljat] „ekrigardo”, aŭ *бодрствующая* [bodrstvujuŝĉaja] „maldorma”. Adjektivoj povas havi tre longan finaĵon: komparu *драматическая* [dramatiĉiskaja] kun ĝia Esperanta traduko „drama”.

Rusaj vortoj ofte aspektas tiel vastaj kaj malrapidetaj kiel la rusaj stepoj. Ĝi estas majest- kaj magi-sona lingvo, kaj en ĝi oni skribis iujn el la plej belaj poemoj en la mondo.

aĵon! Unu avantaĝo, kiun ĝi havas super lingvoj kun senŝanĝaj vortoj, kiel la ĉina, estas ke la vortordo estas tre libera. Ankaŭ kiel la pola, estas tre evidente al kiu gramatika kategorio apartenas iu vorto – tio probable influis la kreinton de Esperanto, kiu parolis ambaŭ lingvojn. Sed pro la deklinaciaj ŝanĝoj kaj aparta alfabeto, eksterlanda vorto, eĉ nomo, devas esti rusigita, kio (kune kun la longa izolado de Rusio)

probable limigis la nombron de prunt-vortoj en tiu lingvo, kompare kun iuj aliaj.

Ankaŭ la verba kampo estas plena de minoj por la lernanto. Ja estas nur tri verbotempoj (prezenco, preterito kaj futuro) kiel en Esperanto, sed ankaŭ ekzistas por la pli multaj verboj du „aspektoj” por finita kaj nefinita agado, kaj oni ne povas antaŭdiri kiel formi el la unu la alian. Eble la plej komplika eco, kiu mirigas studenton, estas la verboj de moviĝo: iri, veturi, flugi, porti, k.s. Se la lingvopolitiko de Sovetio tendencis al la rusa kaj kontraŭ la respublikaj lingvoj kiel la latva, kartvela kaj uzbeka, ĝi tamen estis relative ilumina rilate la etajn lingvojn. Por ili la sovetanoj provizis skribojn kaj librojn, kio probable konsideratus kiel „malekonomia” aliloke. Tio helpis la travivon de tiuj mikrosocioj. Jam evidentiĝas, ke estas ili kiuj plej suferos de la disiĝo de Sovetio.

Sed pri la graveco de la granda rusa lingvo, perilo de unu el la plej belaj literaturoj, ne estas dubo.

Bradley KENDAL



1. Mistradukita en diversajn lingvojn kiel *Milito kaj Paco*. *Мир* [Mir] en moderna rusa signifas „paco” kaj „mondo”. Oni povas imagi mitan komencon de la Malvarma Milito en kiu iu ruso dirus «*Мы требуем мира*» „Ni volas pacon”, sed usonano mistradukis kiel „Ni volas la mondon”!

Kontribuojn por la rubriko „lingvo” vi sendu al:

Girvan MacKay
The Manse, Clonminch
Tullamore, Co. Offaly
Irlando

POPOLOJ

La hucana etno

En la nordaj Karpatoj, sur la teritorio de Bukoveno dividita inter Rumanio kaj Ukrainio, loĝas etno kiun la rumanoj etikedas rusaĉa.

Sed la fakuloj avertas pri la diferenco inter du etnaj grupoj: hucana kaj rutena. Genetike, la hucanoj estas posteuloj de kumanoj kiuj instaligis en la nordaj Karpatoj en la 11a jarcento. La tatara grupo estis asimilita de la rutenoj kaj rumanoj, kaj ties lingvaĵo ege influigis de la rutena, branĉo el ukraina lingvo. Ukrainigita, la huc-dialekto ensorbis ankaŭ vortojn de la rumana lingvaĵo sekve de la kunloĝado de du etnoj dum jarcentoj. „Hucan” aŭ „hucul” estas misformoj de la nomo *gucun* kiun atribuis al si tieaj kumanoj. En 1775 la aŭstria censo registris 6000 hucanojn. Nuntempe ili formas vilaĝan loĝantaron en dudek loĝlokoj el rumana Bukoveno, sed pro la misa enlistigo de la censistoj, ne estas konata la preciza kvanto da rutenoj, ukrainoj kaj hucanoj! Dum sia historio Bukoveno apartenis jen al Rumanio, jen al aŭstrio-hungara imperio, al Ukrainio aŭ Sovetio. Inter 1774 kaj 1918, la tuta provinco troviĝis sub administrado de aŭstroj kaj ukrainoj, de 1918 ĝis 1940 ĝi revenis al la patro-ŝtato Rumanio, de 1940 ĝis 1991 fortensis la nordan parton stalinisma Sovetio, kaj nun ĝi estas dividita inter Rumanio kaj Ukrainio. La huc-lingvaĵo enplektis en si elementojn el la ukraina, pola, germana (de cipceroj), hebrea (judgermana) lingvaĵoj, sed post la dua mondmilito estis submetita al rusigo. En Rumanio oni permesis al lernantoj hucanaj studi ankaŭ la ukrainan kiun ili nur komprenas; sed nek parolis nek parolas eĉ en ties renkontiĝoj kun parencoj el ukraina Bukoveno. Skribe ili ne povas esprimi sin, tial

ili uzas la rumanan lingvon; se ili tamen provas praktiki sian lingvaĵon, la hucanoj uzas latinan alfabeton! Post kleriĝo en mezgradaj kaj altlernejoj, rumana huc-lingvanoj daŭrigas komuniki kun siaj parencoj, samlokanoj per la hejma dialekto – dialekto en kiu ili neniam esprimas ian kulturformon, escepte de la kantaro kiun ja konservas maljunuloj. Post politika malsatreĉiĝo la hucanoj ĉiusemajne vizitas unu la aliajn en la du Bukovenoj. Amuze estas aŭskulti kiel ili strebas kompreniĝi per vortoj el ukraina, rusa kaj rumana vortrezoroj. En la ĉefurbo de rumana Bukoveno malfermis sin antaŭ tri jaroj pedagogia lernejo kun kleriĝo ankaŭ en la ukraina lingvo. Sed gepatroj hucanaj plendas ke instruo en la ukraina lingvo ŝarĝas

la lernejan programon por iliaj idoj.

Huc-identeco

Tri elementoj kontribuas al tiu ĉi gento ian identecon: la danco *Huculka*, la hucul-ĉevalo kaj la antikva ortodoksa kalendaro. Tradician kostumon la hucanoj senpolvigas okaze de la interetnaj festivaloj, kiun ili devas serĉi ĉar malmultaj ekzempleroj ankoraŭ troviĝas ĉe maljunuloj kaj en muzeoj. Loĝinte grandparte sur altaĵoj de Karpatoj hucana familio transportas la necesojn hejmen helpe de ĉevalo kiu portas la nomon de la etno. Por rajdkonkursoj oni bredas ĝin en la bukovena ĉevalbredejo Luĉina. Konfesie la hucanoj estas ortodoksoj sed la plimulto uzas por siaj kristanaj festotagoj la antikvan kalendaron pri kiu Eŭropo rezignis en 1924. Ligita al kristanaj kutimoj estas la ovopentraĵo dum la fasta periodo de Pasko, spirita kaj komerca okupo plenumata en tuta Bukoveno. La huc-ovopentraĵoj diferencas de la rumana per kampo ruĝriĉa. La turistoj vizitontaj Bukovonon dum tiu periodo nepre ricevos donace tiujn ovojn.

Nicolai MACOVEI



Tradiciaj vestaĵoj de la hucanoj troviĝas je malmultaj maljunuloj kaj en muzeoj.

Longe atendata

Jam de longe la franclingva publiko atendis novan tradukan vortaron. La dudirekta vortareto *Dictionnaire de poche* (SAT-Amikaro, 1980) estas vere simpla kaj, kvankam la UEA-katalogo taksas ĝin „taŭga por komencantoj”, ĝi tute ne sekvas ian kriterion de elektado laŭ oftocindicoj. Ankaŭ ĝia pli granda frato, la *Dictionnaire pratique d'Espéranto* (SAT-Amikaro, 1959 kaj 1974) estas magra, malgraŭ siaj 516 paĝoj, pro la maldensa presado de la teksto. La pli detalitaj verkoj (Léger-Albault kaj Waringhien), estas bedaŭrinde nur unudirektaj kaj kostis kune ĉ. 50 nederlandaj guldenoj. Kiu tamen esperis, kiel mi, la alvenon sur la merkato de moderna, sufiĉe ampleksa dudirekta vortaro, devos senreviĝi, ĉar la nova produkto de la franca leksikografio estas unudirekte franca-esperanta. Ĝia esperanta-franca simetriaĵo aperos laŭdire post plimalpli kvar jaroj. Se ties prezo estos tiom alta kiom tiu de la ĵus aperinta verko, franclingvanoj devos elspezi 150 guldenojn, por ekhavi seriozan dudirektan laborilon. Ilia konsolo, tamen, estos, ke ilia akiraĵo estos ampleksa, ĉar tiu ĉi volumo prezentas en 900 paĝoj 32 000 kapvortojn.

La plej okulfrapa trajto de la nova vortaro estas la klareco de la teksto. Tion ni dankas al la granda litertipo kaj al la fakto, ke ĉiu kapvorto komencas apartan linion. La kompostistoj sekvis la ekzemplon de Léger-Albault kaj certe multaj uzantoj alte aprezos tiun maksimuman legeblecon.

Komparante la enhavon kun tiu de la jam menciita Léger-Albault, oni tuj konstatas, ke multaj artikoloj estas konsiderinde pli ampleksaj kaj precizaj. Multnombraj vortoj kaj esprimoj rilate la modernan vivon eniris la verkon kaj preskaŭ ĉiu nuanco estas precizigita per interkrampa helpnoto. Oni trovas ekzemple modernaĵojn kiel *clone*, klonoj; *un tube (chanson à succès)*, gurdajo; *à pleins tubes (puissance sonore maxi)*, plejlaŭte; *(à toute vitesse)*, plejrapide; *un tubeless*, senaertuba pneŭo. Ĉe vortoj el la baza provizo de la lingvo, kiel ekz. *suivre, mettre, comme, tenir, doigt, main, cœur*, ktp., oni ĝuas la kolekton da nuancoj kaj esprimoj. Tamen, ĝuste pro tiu riĉeco, oni povas bedaŭri, ke la longaj artikoloj ne estas pli bone kaj pli klare strukturitaj. Por apartigi ties ĉefajn ŝekciojn, neces-

intus specialaj tipografiaj signoj aŭ litertipo. Tio ebligus samtempe al la aŭtoroj pli rigore ordigi la materialon. Ekzemplojn de tia (relativa) malordo oni trovas i.a. sub *tête* kaj *trouver*.

Nenia vortaro povas tute respondi la atendon kaj postulojn de la uzanto. Ĉiu trovos mankojn kaj kritikindaĵojn. Ankaŭ en tiu ĉi *Grand Dictionnaire*. Ekzemple, la verko finiĝas per listo da esperantigitaj nomoj de urboj kaj landoj. Persone mi rigardas ridinda tiun manion esperantigi proprajn nomojn, kiam ili ne estas internacie sufiĉe konataj. Ĉu estus elegante inviti ne-franclingvan samideanon al rendezuo en Bizontio (*Besançon*), Messo (*Metz*) aŭ Roseo (*Roseau*)? Tamen, ne konsiderante tiajn detalkritikojn, oni povas senhezite aserti, ke la novulo en franclingvujo iĝos ŝatata instrumento sur la tablo de lernemaj esperantistoj.

Emile VAN DAMME

Jacques Le Puil kaj Jean-Pierre Danvy: *Grand dictionnaire français-espéranto*. Eld.: France-Espéranto, Parizo, 1992. 939p. ISBN: 2-9507376-0-9. Prezo ĉe FEL: 1500 BEF + afranko, ĉe UEA: 93 NLG + afranko.

Por bruligo?

Manuskriptoj por bruligo de Ljubomir Trifončovski estas tre modesta 32paĝa broŝureto konsistanta el 13 ege diverskvalitaj eretoj. Malgraŭ la sugesto en la titolo, bruligu ĉion krom paĝoj 5 ĝis 15 ĉar ili enhavas unu sukcesintan tragedieton: *Balado pri la luno kaj la cervo*. Tiun eron oni tamen kapablas finlegi en 100 ĝis 120 sekundoj. Ĉu valoras elspezi tiom da mono por duminuta vojaĝo al Parnaso?

Paul VEENMAN

Ljubomir Trifončovski: *Manuskriptoj por bruligo*. Eld.: Pres-Espéranto, Sofio, 1992. 32p. Prezo ĉe FEL: 90 BEF + afranko, ĉe UEA: 4,50 NLG + afranko.



Humura kaj flua

En la aŭgusta numero de MONATO de 1992 aperis *Denaska kongresano*, plena je verda humuro, verkita de juna sveda aŭtoro Sten Johansson. Tiu ĉi novelo formas, kune kun ok aliaj, grafike modestan sed enhave riĉan verketon. *Denaska kongresano kaj aliaj noveloj* enhavas i.a. tri erojn kiuj jam ricevis premion, aŭ honoran mencion, en la belartaj konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Se vi ŝatas humuron kaj fluan nuntempan Esperanton, vi ne bedaŭros la aĉeton de tiu ĉi libreto. pp

Sten Johansson: *Denaska kongresano kaj aliaj noveloj*. Eld.: Al-fab-et-o, Skövde, 1992. 46p. ISBN: 91-630-1344-4. Prezo ĉe FEL: 150 BEF + afranko, ĉe UEA: 9,60 NLG + afranko.

Deŭterokanonaj libroj

De jardekoj ekzistas eldono de la biblio en Esperanto. Tial por multaj ŝajnos enigma la sciigo, ke oni laboras pri aperigo de „novaj” bibliaj verkoj en esperanta traduko. Fakte estas, ke la t.n. kanono – oficiala listo de la libroj de la kristana Sankta Skribo – ne estas egala en ĉiuj kristanaj eklezioj. La rom-katolikoj havas pli ampleksan biblion. Do, por ili ĝis nun ĝi neniam estis „kompleta”. Mankas i.a. Makabeoj, Tobit, Jesuo Ŝiraf, la „deŭterokanonajoj” aŭ – laŭ kalvinismo – „apokrifoj”. Estas la intenco, ke la sama eldono, kiu prizorgis la londonan eldonon de la biblio, same prezentos la „deŭterokanonajn” verketojn. Kiel redaktisto funkcios Gerrit Berveling. Fakte, tiu ĉi eldono estas iaspeca interetapo ĉe ellaborado de tute nova ekumena traduko de la kompleta biblio, redaktata de Angelo Duranti. Sed ĉi ties efektivigo ankoraŭ postulos multe da tempo. GB

de refo

Minoritatoj

„Rakontu al la tribunalo, kion vi faris posttagmeze la 26an de aprilo!” diris la advokato.

„Mi promenis en la kastela parko. Mi iom ripozis sur benko, ĝuis la varman veteron, kaj kiam ekvesperis, mi ekstartis por reiri hejmen.”

„Ĉu vi vidis aliajn personojn en la parko?”

„Ĝuste kiam mi ekiris, kvin junuloj, tri viroj kaj du virinoj, venis renkonte al mi sur la vojo. Mi ilin rimarkis jam de malproksime, ĉar ili kriis kaj kantaĉis, kredeble ne estis tute malebria. Ili paŝis tra florbedoj kaj distretis la florojn, du ŝiris benkon de la fundamento kaj ĵetis ĝin en la kastelan lageton.”

„Ĉu iu el tiuj kvin ĉeestas ĉi tie en la salono?”

„Jes, ĉiuj kvin sidas tie transe. Mi bone rekonas ilin, ĉar poste mi vidis ilin de proksime.”

La juĝisto interrompis: „Ĉu, vidante ĉion tion, vi ne havis la ideon preni alian vojon por eviti renkonton?”

„Mi volis, sed estas nur unu ponto trans la lageto, tie, kie la digo preskaŭ duonigas ĝin. Mi estus devinta kaŝi min en arbustaro. Kaj iel mi ne volis simple cedi antaŭ iuj, kiuj eĉ ne rekte minacis min.”

La advokato daŭrigis: „Kie vi do renkontis la menciitajn personojn?”

„Sur la digo. Mi jam preskaŭ atingis la ponton meze de la digo, kiam ni renkontiĝis. La vojo estas larĝa nur por tri aŭ kvar personoj, kaj ili okupis la tutan larĝecon, tiel ke mi devis halti.”

Denove la juĝisto interrompis: „Ĉu vi ne povis preterpasi, vadante tra la lago?”

„Mi efektive konsideris tion, sed la lageto estas marĉa, kaj mi sinkus ĝis la femuroj kaj fariĝus tre malpura. Kaj denove, io en mi rifuzis cedi.”

„Kio okazis tiam?” la advokato reprezentis la demandadon.

„Unu moke demandis min, kial mi baras ilian vojon, kaj mi respondis, ke restas sufiĉe da spaco por preterpasi min. Tiam li postulis, ke mi reiru al la komenco de la digo por liberigi ilian vojon. Kvazaŭ por emfazi, li pugnobatis al mia brusto. Mi perdis la sinregon kaj rebatis al li; li iom hezitis, kvazaŭ pro miro, sed denove postulis ke mi reiru, alie ili ĵetos min en la lagon. Mi komprenis la seriozecon de la minaco, mi turniĝis kaj reiris, jen kaj jen ricevante pugnobaton sur la dorso. Mi ne scias kiu batis min ĉar mi ne kuraĝis

turniĝi. Kiam mi preskaŭ atingis la komencon de la digo, iu piedstumbbligis min, tiel ke mi falis surventren. Tiam ili prenis miajn brakojn kaj gambojn kaj ritme kriante ĵetis min en la lagon. Dum eble duona horo ili ne lasis min alboridiĝi; nur kiam ekmallumis kaj mi naĝis al la alia bordo de la lago, ili ŝajne perdis la intereson kaj lasis min eskapi.”

* * *

„Sinjoro prokuroro, ĉu vi havas ankoraŭ demandojn?”

„Dankon, sinjoro juĝisto. Mi volas demandi la akuzaton, kial li, malgraŭ la ĵusa plena konfeso, komence de la proceso deklaris sin ‚ne kulpa.’”

„Sed mi faris nenion! Mi eĉ ne havis eblecon defendi min! Estis tiuj huliganoj, kiuj difektis la parkon, batis min kaj ĵetis min akven...”

„Bonvolu ne insulti aŭ kulpigi la atestantojn. Estas vi la akuzato. Ĉu vi povas nei, ke sen via ĉeesto en la parko la afero ne okazus?”

„Ĝuste. Sed mi ja havis plenan rajton esti tie, kaj mi ne povis antaŭvidi...”

„Sed vi povis antaŭvidi la renkonton sur la digo. Se vi tuj reirus kaj kaŝus vin anstataŭ insisti je via tiel nomata rajto, vi evitus la tutan aferon.”

„Jam ili estis detruintaj la bedojn kaj la benkon. Ne estis mi kiu instigis ilin al perforto! Kaj mi havis la saman rajton iri sur tiu vojo, kiel ili.”

„Akuzato, vi evidente estas konfuzita. Tiuj homoj estis kvin, kaj vi estis nur unu. Ili do havis la rajton de la plimulto. Kaj eĉ se ili lasus al vi vian ‚minoritatan rajton’ kaj cedus unu sesonon de la vojo, ĉu tio utilis al vi? Sesono de la vojo ne sufiĉas por preterpasi.”

„Sed ĉu okaza plimulteco gravas? Ĉu ne estas pli grave ke tiuj huliganoj estas nur grupeto en la civitanaro, kiu devas protekti sin kontraŭ ili?”

„Vi eble spektis tro da filmoj el la dudeka jarcento. Tiam la justico kredis, ke la societo devas protekti unuopulojn kontraŭ krimoj, sed tio montriĝis praktike nefarebla, ĉar huliganaĵoj tro oftigis, kaj atestantoj preskaŭ neniam ekzistis. Tial jam en 1996 oni enkondukis la leĝon, ke grupo ĉiam pravus kontraŭ unuopuloj. Tiu leĝo estas tre saĝa, ĉar ĝi favoras la sociajn kunvivon kaj kunlaboradon, kaj forprenas de homoj la timon malpravi. Vi sendube konas tiun leĝon, kaj vi grave eraris iri en la parkon sola.”

„Jes, mi konas la leĝon. Ĝi estas krue-la! Ĝi signifas ne nur, ke unuopulo estas senpova kontraŭ bandoj, sed ke ankaŭ la socio estas senpova kontraŭ

ili! Ili povas detrui, bati, eĉ murdi...”

„Bonvolu pripensi, kion vi diras, akuzato. Ĉu ne ankaŭ vi foje sentas la impulson detrui alies posedaĵon aŭ eĉ bati iun?”

„Nu je-es, okazas tio. Sed kutime mi konscias, ke tio ne helpus al mi, kaj ne faras.”

„Ĉi tiuj atestantoj, kiujn vi nomis huliganoj, ne havas tiun konscion. Ili sentas, ke apliko de perforto almenaŭ momente benefikas al ili. La sola afero, kiu regulas ilin, estas ilia grupo, kiun vi nomis bando. Sen la neskribitaj, sed firmaj reguloj de tiu grupo, kiu donas al ili respekton kaj valoron, ili estus senhelpaj, eble dum kelkaj jaroj vivus trankvile kaj fine eksplodus en iu krimo.”

„Vi, akuzato, evidente ne havas tian ligitecon al iu grupo kaj tial ne povas vere kompreni la gravecon de la grupaj strukturoj en nia socio. Vi ne komprenas ke estis via devo cedi antaŭ la plimulto de tiuj kvin personoj, ke vi grave endanĝerigis nian juran sistemon, kaj ke vi devigis la atestantojn apliki perforton al vi. Vi eĉ havis la impertentecon rebati unu el ili. Pro tio mi en mia pledo proponos la maksimuman punon por tiu krimo: dek jarojn en prizono.”

* * *

„Akuzato, ekstaru por aŭdi la verdikton!”

„Ĉi tiu tribunalo juĝas vin kulpa pri endanĝerigo de sociaj strukturoj. Ĝi kondamnas vin al kvinjara mallibereco.”

„Spite la proponon de la prokuroro, la tribunalo ne aplikis la maksimuman punon. Ĝi agnoskas, ke la akuzato ja posedas socian konscion, kvankam tiu ĉi, erare, direktiĝas ne al iu aparta grupo, sed al la tuta socio. Tia idealisma aberacio estas malaprobinda, sed ĝi povas esti bazo por reeduko.”

„La senco de malliberigo ne estas venĝo al krimulo, ankaŭ ne malhelpo de pliaj krimoj. La senco estas reeduko. En malliberejo, krimulo trafas en ĝanĝalon, kie unuopulo ne povas pluvivi. Li lernas, ke ĉiu grupo, en kiu li povas aniĝi, estas lia amiko, kaj ke la socio, kiu metis lin en la malliberejon, estas lia malamiko. Tiel li perdas sian individuecon kaj evoluigas konscion pri la supera graveco de grupaj strukturoj.”

„La longeco de la puno devas esti sufiĉa, por ke la krimulo ĉesu atendi liberigon kaj koncentriĝu al la nuntempo. Tiu ĉi tribunalo konvinkiĝis, ke en la aktuala kazo por tio sufiĉas kvinjara puno, kaj ke post tiu tempo vi prenos vian lokon kiel taŭga grupano.”

de Emile Van Damme

ODO AL LA CICOJ

Estu odo al la cicoj!

Al la cico ŝtona de l' faraono,
milfoje polurita de silenta sklava mano,
cico hodiaŭ docila, kiu
akceptas la fekajon de l' ibiso
sub la vora suno de l' sabloj.

Faraono,
via voĉo pli potenca ol
la tria katarakto de la miljara Nilo
ordonis vivon aŭ morton,
sed, ĉu via cico iam tremetis
sub kareso sincera ?

Odo estu al la cicoj !

Al la cico sub la punta korsaĵo
de la korteganino,
kiu lasas servistineton
pinĉi ĝin petole.
Al tiu sub la silka ĉemizeto
de fraŭlino marŝanta kontraŭvente
kun defia okulo.

Al tiu sub la tro larĝa bluzo
de la panist-edzino,
kiu tiom profunde plonĝas
en la pankorbon

Kaj ankaŭ al la cico de l' civitano tro fiero,
ĉar cicoj aparte taŭgas por la torturo.
Jam la nura vido de ili
ekscitas la sbirojn
kaj garantias seriozan deĵoron.
Plie, kiom precize l' elektrodo avida
kaptas ilin inter siaj feraj makzeloj!

Amazonoj havas nur unu.
Tial la sago elfluganta ne vundas ilin.
Nur duone spertus ili
l' elektran torturadon.

ALBUĈEJAJ BESTOJ

I

Albuĉeja ĉevalaĉo
falinta pavimen.
Anhelas
la kava ripo.
Mortŝvito
sur la ŝtono.
Okulfiksa
rigardo.
La blua kitelo
de la vendisto
moviĝas
en la pupilo.

II

Albuĉeja bovino
tuŝas
rigidkrure
la nekutiman
stratŝtonon.
Amaso jam ĉe la bushaltejo.
Granda,
la blanka okulo
ankoraŭ moviĝas
en la orbito.
La buso malfruiĝas.
Denove.

III

Ili venas el foraj landoj,
kaj la kruco kristana de la kirko
sur tiu placo
en griza antaŭurbo Brusela

kaj la krescento de l' ora Islamo
sur l' apuda moskeo

kaj ankaŭ la nigraripa ĉevalo,
la falinto, la mortŝvitanto
sendita el la nebula Irlando.

Jam rompiĝis al ĝi la kruro
dum la skua vojaĝo
kaj jam l' okulo ne plu
rigardas al la mondo.

Ne venas el fora lando,
nur de tridek kilometroj,
la granitaj stratŝtonoj,
sur kiuj la ĉevalo
elspiros sian lastan anhelon,
post tretado de tiom da vojoj
sub la rigardo de tiom da dioj

LA BALADO DE LA DROGATO

El la nokto li enpaŝis
la tavernon de l' fidrinko.
Lia mano ĉe la pordo spasmis
sur la kupra klinko

Li kuris for de sia sort'
Jam sekvas lin la pala mort'

Dum la lastaj nigraj metroj
de la strata duonlumo
tra la kapo lia boris
la akraj pintoj de harpuno

Aŭtoj vipis laŭtajn knalojn
al l' orelo, violente
tiom ke li surtrotuare
ŝanceliĝis dummomente

Li kuris for de sia sort'
Jam sekvas lin la pala mort'

Tamen nun la rokmuziko
batas tra la bluaj fumo
de la multaj cigaredoj
brulaj sub la neonlumo

Sur la sojlo jen li staras
sange ruĝa sur la frunto
pro l' elektra reklamŝildo
kiu ekflamas dum sekundo

Li kuris for de sia sort'
Jam sekvas lin la pala mort'

Kie do la fivendisto
Kaŝas sin ĉe l' tablo glima?
Blindaj senrespondaj kapoj
Lumas sub hararo ŝlima.

Febroplene nun li stumblas:
Kie vi, dolarhirudo?
Al l' infero mi vin sendos,
Sangavida hundinido

Li kuris for de sia sort'
Jam sekvas lin la pala mort'

Brilas akre jam pafilo
En la mano de l' povrulo.
Ŝiras strida krio l' kapon
De l' freneza somnambulo

Pafas li al la vendisto
Ruĝas ĉe la kor' makulo
Klamas ĉiuj en hororo
Fuĝas la narkotikulo

Li kuris for de sia sort'
Jam sekvas lin la pala mort'
Kaj kuros li dum cent mil jaroj
Postkuros lin cent mil koŝmaroj.
Kaj kuros li dum cent mil jaroj
postkuros lin cent mil koŝmaroj.

HAROLD LLOYD

Harold Lloyd, la komikulo,
pendadis de la horloĝo
sur la lasta etaĝo de nubskrapulo.
Ungoj alhokas la grandan montrilon
kruroj svingas, okuloj ŝveliĝas,
baldaŭ la sesa kaj duono.

Tiel gestadas ankaŭ mi,
alkroĉe al iu verso.

Harold Lloyd (1893-1971), komika usona
filmaktoro En *Safety Last* (1923; Sekureco
laste) li surgrimpas nubskrapulon.

Zairio antaŭ 30 jaroj

La serio de MONATO, verkita de Edward Symoens

En longa serio da artikoloj, kiuj aperis en MONATO en 1980 kaj 1981, mi rakontis pri miaj travivaĵoj en Belga Kongo, de 1947 ĝis 1960, la jaro de ĝia sendependiĝo. Post iom pli ol 30 jaroj eble estas interese rerigardi tiun viglan periodon, kiu havis tiom da dramaj sekvoj por tiu centre afrika lando. La historion mi nur traktas kiel fonon de miaj propraj spertoj kaj travivaĵoj dum tiuj febraj jaroj, kaj tio sen kiu ajn antaŭjuĝo.

La jaroj post la 30a de junio 1960 verŝajne apartenas al la plej intensaj de mia vivo, ĉar mi partoprenis naskiĝon de nova ŝtato - dolorplenan kaj ĥaosan naskiĝon. Kiom da homoj havas la ŝancon fari tian sperton?

Mi memorigas al tiuj kiuj ne legis la unuan serion da artikoloj, ke en 1947, kun mia edzino kaj kvar infanoj (du pliaj naskiĝos en Afriko), mi iris al la belga kolonio Kongo kiel instruisto, ke de post 1949 mi estris grandan kaj prestiĝan belgan lernejon en la ĉefurbo Leopold-urbo (hodiaŭ Kinŝaso), kies gelnantoj estis eŭropanoj kaj ekde 1954 ankaŭ afrikanoj. En 1960, la unua nigrujo en la kolonio diplomitiĝis en mia lernejo laŭ la belga instruoprogramo: Willy Blackson el Ora Marbordo. Poste li daŭrigis brilajn jurajn studojn en Belgio.

Nepreparita sendependeco

Mi jam rakontis, ke la sendependiĝo de Kongo estis malbonege preparita. Ĝi fakte ne estis preparita, sed donita sen preparo, sub triopa premo: la interne afrika, la interne belga kaj la internacia. Sendependeco estas normala mensa kaj politika historia evoluo. Oni nur forgesis ke grandega parto de la loĝantaro tute ne estis nek mense, nek teknike preparita al aŭtonomio, al memregado laŭ moderna modelo. Ili eĉ ne sciis kion tio signifas. Jes, ili ja sincere kredis, ke estos paradizo surtera, ke ili ne plu estos devigataj labori, ke ili ricevos la domojn kaj la virinojn de la blankuloj, ĉar estas tiel ke la pseŭdopolitikistoj anoncis la sendependecon al la facilcredema loĝantaro.

Inter la aktivaj politikistoj estis nur kelkaj valoraj homoj, konsciaj pri la vera signifo de aŭtonomio, sed la plimulto estis demagogoj, kiuj interesiĝis nur pri personaj kaj klanaj avantaĝoj, uzante nur kelkajn suprajajn sloganojn por konvinki la amasojn, kiuj ne klare aŭ eĉ tute ne sciis pri kio temas.

Tiuj politikaj sorĉistoj-leranto estis je la bazo de la tribaj ribeloj kaj disputoj, kiuj eksplodis ĉie tra la grandega lando kaj necesigis la daŭran intervenon de la armeo.

Ĉi tiu moviĝis dum monatoj tie kaj aliloke por pacigi la plej maltrankvilajn regionojn, kaj baldaŭ ĝi estis elĉerpita kaj ege nervoza. Multaj eŭropaj virinoj kaj infanoj forlasis sian duan patrolandon, kaj en la administrejoj oni preparis sin al... io, kion neniu konis nek povis imagi. Surpapere, nenio grave ŝanĝiĝos. Plej multaj funkciuloj daŭrigos sian laboron sub la gvidado de enlanda, nigra registaro kaj nigra prezidanto. Por resti en la lando, kiun ili elkore kaj sincere amas, plej multaj eŭropanoj konsentis riski tiun transiron kaj plej ofte intencis „ludi la rolon”, t.e. sincere helpi al pluevoluado de la juna ŝtato.

Tamen, subhaŭte, kaŝe kuŝas dubo pri la finfina sukceso de la giganta politika operacio, precipe pro la negativa, egoisma mensostato de la plej multaj politikistoj, pro iliaj agadoj kaj neplenumebaj falsaj promesoj faritaj al la nescianta popolo, pro la manko de kapabla gvidantaro en la administrejo. Vere komenciĝos la granda, nekonata kaj neantaŭvidebla politika aventuro.

Eraroj de Belgio

Mi antaŭe jam skribis, ke la belga politikistaro duoble kulpas pro la malfavore evoluanta situacio en sia kolonio. Unue, ĉar malgraŭ proponoj el la kolonio mem faritaj ekde 1947 de la vicĝenerala guberniestro Petillon [Petijó], Bruselo ne konsentis reformi la lokajn administrejojn, donante pli grandan respondecon al surlokaj enlandaj administrantoj kaj tiel eduki ilin al moderna estrado de la publika komuna vivo. Due, ĉar tro facile cedinte al diversaj internaj kaj eksteraj premoj, Belgio donis al nepreparita popolo tujan kaj senkondiĉan sendependecon, anstataŭ laŭplane - ja ekzistis



Tiama prezidanto de Kongo, Kaza Vubu, kaj je lia maldekstra flanko la verkinto de tiu ĉi artikol-serio.

taŭgaj realismaj alternativoj - prepari unue la internan aŭtonomecon, kaj nur poste la kompletan sendependecon. Estis kombino de nerealistika idealismo kaj malkuraĝo.

La belga registaro do komence de 1960 organizis en Bruselo „ronda-tablo“-konferencon por diskuti pri la estonto de la kolonio. La enlandaj reprezentantoj postulis la tujan kaj senkondiĉan sendependecon. Belgio cedis, kaj oni interkonsentis pri la dato de la transdono de la suvereneco: la 30a de junio de la sama jaro. Oni do senprokraste organizis ĝeneralajn elektojn ĉe popolo kiu ne scias kion tio signifas kaj laŭ eŭropa modelo, kiu tute ne estas adaptita al la afrika mensostato kaj pensmaniero.

Du rivaloj

Prezidanto iĝis Kasa Vubu, eksinstruisto kaj ĉefministro iĝis Patrice Lumumba, ekspoŝtovicisto (kiu cetere estis enkarcerigita pro forrabo de mono kaj liberigita por partopreni en Bruselo la supre menciitan konferencon). Pro sia ekstrema, politike maldoktra, senkompromisa, sennuanca kaj precipe demagoge negativa sinteno, Lumumba personigis la radikalan alon de la sendependemuloj. Lia politika rivalo, Kasa Vubu reprezentis la pli moderajn, pli realismajn tendencojn.

Dum pluraj jaroj mi renkontis Kasa Vubu en komisiono kiu ekde la unuaj jaroj decidis pri la akcepto aŭ malakcepto de rasmiksitoj en la belgaj lernejoj. Tiu akcepto fariĝis surbaze de socia enketo por plifaciligi la asimiladon en por ili ofte fremda medio. La sistemo bone funkciis. Kiam mi estis akceptinta la unuan nigrulon en mia lernejo en 1954, la komisiono poste laŭ la sama metodo pritraktis la novajn kandidat-lernejanojn. Ĵus antaŭ la sendependiĝo, mia lernejo nombris tri kvaronojn da eŭropanoj kaj unu kvaronon da afrikanoj, la plej altan procentaĵon en la kolonio. Tiu ĉi situacio ekestis sen iu ajn rasa problemo, danke al la sekvita metodo de akceptado. En la komisiono Kasa Vubu estis tre kviet-temperamenta kvankam konvinkita naciema homo.

La politika vivo de la juna ŝtato komenciĝis per gravaj internaj konfliktoj kaj malkonsento ĉe la respondeca kazo. Tiu malkonsento evidentiĝis dum la solena transdono de la suvereneco en la parlamentejo, en ĉeesto de la belgaj reĝo, ĉefministro kaj multnombraj aliaj naciaj kaj internaciaj eminentuloj. Ankaŭ mi havis la okazon eniri la parlamentejon. Ĉio glate funkciis, ĝis Lumumba prononcis tiom akran, rancoran, emocie insultan paroladon kontraŭ la belgoj kaj la belga ŝtato, ke glacia etoso enpenetris ĉies korojn kaj cerbojn. Per tiu aĉa parolado, maldokvata por ĉefministro en tia solena momento, Lumumba politike izolis sin mem, enlande kaj grandparte eksterlande. Nur en ekstreme komunismaj landoj kaj medioj, oni principe aplaudis lin. Li nur liberigis la negativajn, fiajn kaj detruajn sentojn, kiuj troviĝas ĉe ĉiuj popoloj en la mondo, sed per kiuj bedaŭrinde ne eblas konstrui organizitan, paceman kaj vivkapablan nacion. En tiu ege malfavora kaj peza etoso do naskiĝis la nova respubliko Kongo. Por Lumumba tio signifis la komencon de la fino, ĉar li post nelonge mortos en vere dramaj cirkonstancoj, pri kiuj mi raportos poste.

Unuaj ribeloj

La 1an de julio mi aviadile forlasis la novan respublikon por libertempi en Belgio, sed kun la sincera intenco reveni komence de septembro por daŭrigi mian lernejan laboron. Kio okazos? Neniu sciis.

La 4an per la radio mi eksciis pri la ribelo de la armeo, unue en la garnizono de Thijs-urbo [Tejs], 140 km for de la ĉefurbo Leopold-urbo, poste en la ĉefurbo mem kaj en aliaj lokoj tra la lando, kun la tradiciaj sekvoj de ĉiuj ribeloj: rabado, perfortado de virinoj, turmentado de senkulpuloj, drinkado, kriado. Sekve al tio, la plimulto de la



Ĉu la tiutempaj kune ludantaj blankaj kaj nigraj infanoj povas nun ankoraŭ pace vivi kune?

blankuloj, certe preskaŭ ĉiuj virinoj kaj infanoj, klopodis fuĝi ĉu per aviadilo, ĉu per pramo al Brazza-urbo je la alia bordo de la Kongo-rivero, ĉu al Matadi por trovi lokon sur iu pasaĝerŝipo. Malorda, panika fuĝo por eskapi la malsekurecon, kelkfoje eĉ la inferon. Tiu ribelo estis la rekta sekvo de la lacego de la soldatoj, pri kio mi jam parolis, kaj de nepardonebla eraro farita de la belga generalo kiu komandis la armeon. Ŝajne, li estis dirinta al siaj soldatoj: „Via lando nun estas sendependa, sed tio ne ŝanĝos ion ajn por vi. Ni plenumos nian devon kiel antaŭe.” Ni ne forgesu, ke en la armeo estis neniu nigra oficiro, ke la plej alta grado atingebla por la afrikanoj estis suboficiro. Ili certe atendis, prave, ion konkretan, ion videblan de la sendependeco.

La lacego de la soldatoj kaj la psikologia eraro de la generalo, aldonitaj al la ĝenerala malamika sinteno de la ĉefministro rilate al ĉiuj fremduloj, iomete klarigas tiun eksplodon de perforto kaj amareco, sen justigi nek pravigi ĝin.

En la unuaj momentoj, la ribelo ŝajne eĉ direktiĝis kontraŭ la registaro, kiu paradadis en belegaj, grandegaj kaj luksegaj aŭtomobiloj, sed Lumumba facile orientis la furiozon kontraŭ la fremduloj... Pri tiu drama situacio la radio daŭre raportadis. En pluraj provincoj, kiuj laŭ la nova konstitucio disponis pri kompletaj registaroj, la lokaj potenculoj kalumniis senĉese kaj plej aĉe la belgojn kaj tiel incitis la junularon kontraŭ ĉiuj fremduloj. Rezultiĝis la sama ĥaoso kiel en la ĉefurbo. Tra la tuta lando blovis ventego de malamo, perforto, masakro, kaj la politik-

istoj malorganizis por multaj jaroj sian propran, junan kaj promesplenan nacion.

Kelkaj belgaj funkciuloj, kiuj estis restintaj surloke, lanĉis radioalvokojn al kolegoj ne forlasi sian postenon. El Bruselo, la ministroj same lanĉis alvokon kaj promesis novan pli favoran statuson por la belgaj funkciuloj, sed tio ne savis la situacion.

Unueco en danĝero

Intertempe, la plej riĉa kupro-provinco de Kongo, Katanga (nun Ŝaba) proklamis sin sendependa ŝtato, sub la energia gvidado de riĉa komercisto Moïse Tsjombe [Ĉombe]. Tiu ŝtato baldaŭ disponis pri propra mono, propra armeo, propra konstitucio, propra himno, kaj bonege funkciis. Multaj fremduloj, kiuj komence de julio estis fuĝintaj en la najbarajn landojn, revenis kaj daŭrigis sian laboron kun granda entuziasmo.

Vera patriotisma sento kunigis ĉiujn katangananojn, blankulojn kaj nigrulojn. Belgio, intertempe, sendis paraŝutistojn al diversaj plej minacataj lokoj por savi siajn samlandanojn. Tiu operacio kompreneble estis kondamnata ne nur de la juna respubliko Kongo, sed de multaj aliaj landoj kaj internaciaj instancoj.

La sekureckonsilio de Unuiĝinta Naciaro (UN) urĝe kunvenis, oficiale kondamnis Belgion kaj akceptis la postulon de Lumumba sendi internacian kontingenton de soldatoj. Tiel alvenis armeo de plej diversaj nacioj, kiu ludos gravan rolon en la plia evoluo de la situacio, precipe rilate al Katango.

(daŭrigo en la venonta numero)

ISRAELO

Integrigo per muziko

Bone konata ŝerco en Israelo asertas: se enmigrinto el Rusio venas el aviadilo sen violono en la manoj – tio signifas ke li estas... pianisto. Kaj vere, inter la rusaj judoj kiuj migras al Israelo troviĝas multege da muzikistoj.

Judoj ĉiam elstaris en la rusa muzika vivo. Sufiĉas nur memori pri la nomoj Rubinstein, Ojstrah, Gilels kaj multaj aliaj. Judaj familioj en Sovetio ofte sendis infanojn por lerni muzikon kaj la plej sukcesaj el ili poste instruis, ludis en teatroj kaj filharmonioj, koncertis en Sovetio kaj eksterlande. Kaj nuntempe tia ĉi talenta kaj krea muzikistaro venas al Israelo. En tiel malgranda lando ne estas facile trovi laboron por ĉiuj.

Jam ekzistas orkestroj kiuj preskaŭ entute konsistas el 'rusaj' muzikistoj. Sed tio ĉi ne solvas la problemon. En la stratoj de Jerusalemo kaj Tel-Avivo ekaperis strat-muzikantoj, kiuj ludas kaj kantas sovetan muzikon. La plej pesimismaj el la iamaj muzikistoj jam lernas labori per komputilo kaj serĉas postenojn kiel sekretarioj – la tajpado memorigas al ili pianludadon. La prezoj de privataj muziklecionoj draste malaltiĝis, kaj nuntempe eĉ tre malriĉaj familioj povas edukigi siajn infanojn ĉe 'rusaj' profesoroj.

Kaj jen nova iniciato de la ministrejo pri integrado, kiu okupas sin pri la novaj enmigrintoj: ĝi parte subvencios la salajron de la instruistoj de muziko, laborantaj en la arabaj komunumoj en Israelo.

Tiaj ekzemploj jam funkcias kaj ili estas sukcesaj. La mono por la projekto venas ankaŭ el eksterlando. Germana filantropia organizaĵo donacis 80 000 markojn por starigi tiajn klasojn por arabaj lernantoj. Ili ricevas instruadon fare de bonegaj specialistoj, kaj la muzikistoj mem – stabilan salajron kaj la senton ke ankaŭ ili ion kontribuas al la paca kunvivado kaj kompreno inter araboj kaj judoj en Israelo.

Eugenia FAJGENBOIM

Pafo, trafo

„Ja estas io simila inter la pafarko kaj la violono,” pensis Aleks Lahter, la trejnisto de la israela pafarkista teamo. Li trovis similecon en la pozicio de la korpo, la sendependa laboro de la manoj, kaj en la momento de kon-

centrigo. Violonisto ludas ne kun manoj, sed kun animo. Same pafarkisto ne povas pafi simple, senemocie. Ekzemple, la dufoja mondĉampiono Natalia Butuzova imagis centre de la celdisko sian stipendion, sen kiu ŝi ne povus daŭre okupiĝi pri pafarkado.

Aleks Lahter rakontis pri sia interesa hipotezo al Amnon Vainŝtein, konata majstro de la violono kaj granda amato de pafarkado. Ĉiujare Vainŝtein okazigas kursojn por junaj ludantoj en kibuco Ajalon, en la nordo de Israelo: partoprenas gejunuloj el multaj landoj. Kaj li proponis ke Aleks Lahter instruu pafarkadon al la violonistoj. La rezulto estis bonega: dum du tagoj la muzikistoj lernis pli ol kutimaj komentantoj sukcesas lerni dum du monatoj. Kaj kiam la Israela Ĉambra Orkestro piknikis kun la fama violonisto Slomo Mintz okaze de la malfermiĝo de nova koncerta sezono, la muzikistoj amuziĝis per pafarkado sub la gvido de Lahter kaj Vainŝtein. Kaj plejparte trafis la centron de la celdisko!

Eugenia FAJGENBOIM

MUZIKO

1992: Kial mi?

1993: Kial ĉi?

Irlando estas hejmo de originala kaj paradoksa popolo. Ĉar irlanda kanto (Kial mi?) gajnis la kantokonkurson de Eŭrovizio en 1992 (MONATO 1992/7, p. 30), la Irlanda Respubliko gastigos en 1993 la 38an konkurson. Ĝis nun, ĉiu gastiganta lando elektis por tiu festivalo sian ĉefurbon, aŭ alian gravan kaj prefere facile alireblan lokon en Irlando, nome Millstreet [Milstreet], gaele, Sráid an Mhuilinn [Srodj an Úilinn], en la sud-okcidenta regiono de la insulo.




Linda Martin

Laŭ la kriterio de la unika irlanda logiko, tiu loko bone taŭgas, ĉar ĝi: 1) estas tre malgranda vilaĝo (nur 1500 loĝantoj), do povas loĝigi tre malmulte da vizitantoj; 2) havas nek stacidomon, nek apudan flughavenon, nur ege malrapidan kamparan aŭtobus-servon; 3) estas tute nekonata en Eŭropo, kaj eĉ en Irlando, preskaŭ nekonata; 4) estas vilaĝo, kiu posedas nenian turisman allogaĵon, krom la plej granda tegmentita ĉevaldresejo en Irlando.

Laŭ la loĝantoj de la vilaĝo, Millstreet estas tre agrabla loko en bela regiono. Do ne hezitu...

Garban MacAOIDH



Sráid an Mhuilinn po
127091 'sra:d'ə'vil'ən'

Co Millstreet



Havajo

Ĉar mi diplomatiĝis en decembro, mi estis regalata de miaj tre kontentaj gepatroj per vojaĝo al Havajo. Mi estis vere feliĉa povi lasi la malvarmegan landon en kiu mi vivas, kaj atingis esperoplene la insularon en la Pacifika Oceano. Feliĉe miaj plej frenezaj revoj plenumiĝis, kaj mi estis fascinata de tiu loko, en kiu ŝajne ĉiuj popoloj scipovas vivi kune.

lun matenon, sekvante sekretan splenon, mi promenatis tra la ĉina kvartalo. Malsato min pikis, tamen, ĉar la donaco ne inkluzivis miajn kostojn, kaj ĉiun tagon mi devis elspezi ŝparitaĵon. Malriĉa studento do vagis akompanata nur de sia malplena stomako kaj de la esperantista flagego sur la brusto. Mi vagis kaj vagis, kaj je ĉiu restoracio mi restetis kaj rigardis al la bonaĵoj nepageblaj. Ĝis kiam maljunulino eliris el sia bakejo kaj, kun kompatoplena alvido, min regalis per kuketo.


Nu, mi jam estis kontentega, sed imagu mian vizaĝon kiam ŝi ekkriis: „Esperantisto!” Ĉio devis resti kiel ĝi statis, ŝi fermis la butikon kaj kunvokis la tutan familion. Jen fine esperantisto! Ŝi rakontis, ke ŝiaj prapatroj venis el Ĉinio, kaj ke ŝi ĉiam volis viziti sian gepatran landon. Ĉar ŝi ne povis eklerni la ĉinan (ĉar tro malfacila), ŝi decidis eklerni la esperantan. Domaĝe kiam ŝi parolis sufiĉe bone la lingvon, la landlimoj estis fermitaj, kaj ŝi neniam povis vivigi sian revon.

Tamen, ŝi ĉiam estis revanta pri tiu tago, kiam ŝi fine ekparolos kun esperantisto vera, el eksterlando. Kaj ŝi tuj inventis tagmanĝon malavaran por mi, ĉiel ĉina kaj havaja – kaj pluran fojon mi dankis la ĉielon pro Esperanto. Kaj jen la menuo:

Spinaca salato, Malihini'

Ingrediencoj: 1 kg da spinaco, jam boligita kaj disgutita; 4 cepoj, prefere verdaj; 2 oranĝoj; 6 tranĉaĵoj da fumoĵita ŝinko; iom da miela mustardo. Ni dispecigas la spinacon, tranĉas la cepojn en maldikegajn striojn kaj la oranĝojn en pecetojn. Ĉion ni metas en grandan salatujon kaj aldonas konvenan kvanton da mustardo. La ŝinkon ni fritas kaj aldonas al la salato jam entelerigita.

Ĉu vi jam demandis vin kio signifas tiu mistera ‚malihini'? Ĝi estas la havaja vorto por ‚fremdulo’.



Ŝeĉuana viandaĵo

Ingrediencoj: 1 kg da bovviando, 1 glaso da sojo, 1/2 glaso da riza vinagro, 1/2 glaso da akvo, 1 k-eto da ĉina spicmiksaĵo, 1 k-eto da stelaniŝo; 1 malgranda ĉina brasiko, 1 cepo. Ni tranĉas la viandon en kubetojn, aldonas la likvaĵojn kaj la spicojn. Ni kovras poton per folioj de ĉina brasiko kaj surŝutas per la tranĉita cepo kaj la vianda miksaĵo. Ni kovras per brasikaj folioj kaj ekboligas. Kiam la poto murmuris, ni malaltigas la varmon kaj boletigas dum horo aŭ iom pli. Ne forgesu la rizon!

Ĉi tiu estis tipa ĉina specialaĵo, do ne povis manki laŭdo de la usona nacio:

Karotkuko de la Insuloj

Ingrediencoj: 250 g da tritika faruno, 2 k-etoj da bakpulvoro, 2 k-etoj da cinamo, 1 k-eto da muskato, 1/2 k-eto da salo; 600 g da raspitaj karotoj, 4 tranĉaĵoj da ananaso, fajne dispecigitaj, 300 g da sukero, 200 g da oleo, 3 ovojn, 150 g da nuksojn; 200 g da sukerpulvoro, 3 k-ojn da citronsuko. En ujo ni unue miksas la sekajn ingrediencojn (ĝis la salo inkluzive). En alia ni kombinas la likvajn kaj malsekajn (ĝis la nuksojn). Dume ni trovas la tem-

pon ekfajrigi la fornon ĝis 170°C kaj jen povas turnmovi la sekajn en la malsekajn ingrediencojn. La paston ni verŝas en alian ujon kaj bakas dum iomaj 30 minutoj. Kiam la kuko estas malvarma, ni kirlas la sukron en la sukropulvoron kaj surŝutas la supraĵon per ĝi. Kiam la glazuro malmoliĝas, la kuko estas manĝopreta.

Kiu preferas povas malsekigi la dolĉaĵon per iu likvoro antaŭ ol glazuri ĝin. Ĝi tuj iĝas pli spica.

Mi probable neniam revidos tiun virinon en mia vivo. Ŝi jam maljunis kiam ni renkontis unu la alian, kaj mi eble neniam havos la monon revojaĝi al tiu feliĉa insulo. Sed, esperantistoj, se vi vizitas Honolulu-n, ne forgesu saluti sinjorinon Wang, ie en MaunaKea St. Ŝi certe estos same ĉarma kiel ĉe mi, kvankam pri la tagmanĝo mi ne povas garanti...

Marco GAZZETTA

Viajn kontribuojn por la rubriko „kuirado” sendu al:

Marco Gazzetta
via Antonio Pignatelli 27
Interno 17
I-00153 Roma
Itallo

Ĉi-MONATE nia rideto-paĝo fontas el la plumo de NikSt [Nikst], kiu proponas al ni vidpunkton (fikcian, mi esperas) pri la nupta stato, pri interrilatado en la (ge)edza vivo, pri elreviĝo. Legantoj certe konas la artikolojn de NikSt [Nikst] pri la vivo de eksrusoj en eks-Sovetio, sed eble ne scias ke li/ŝi/ĝi havas pli gajajn facetojn. Fakte, kvankam li/ŝi/ĝi daŭre verkas de malantaŭ pseŭdonimo, oni ne riproĉu lin/ŝin/ĝin pri tio. Li/ŝi/ĝi ja rajtas fari tion, eĉ se tio ne plaĉas al du-tri mil legantoj. Sed mi povas preskaŭ oficiale deklari ke, malgraŭ persista onidirado, NikSt [Nikst] ne estas Henri Knobbs [Ori Nobz] el Nîmes, Francio.

Feministoj¹ ne koleriĝu, se la ŝercoj ŝajne celas ĉefe la inon; ĉu ne Zamenhof mem diris: „Por fari l' inon inde racia, ne sufiĉas nomi ŝin tia.”? (Mia demandilo). Do se edzinoj kaj fianĉinoj vidiĝas kiel iaj monstroj, eble oni serĉu la kulpon ĉe la viroj. Ĉu ne, ĉu? En la vortoj de NikSt [Nikst] – sed legu mem kion li/ŝi/ĝi volas diri:

FARBE VARBA

„Se vi rifuzos min,” li diris, „mi mortos!” Ŝi rifuzis. Post sesdek jaroj li mortis.

Patro al sia filo: „Kiam vi edziĝos, vi komprenos kio estas vera feliĉo. Tamen tiam jam estos tro malfrue...”

„Paĉjo, mi opinias ke Ĝoni volas edziĝi kun mi!”

„Kial vi diras tion?”

„Hieraŭ li mortpafis sian edzinon...”

LA KOMENCO DE LA FINO

Edzoparo alvenas al la loka urbodomo por registriĝi. Deĵoristo demandas al ili: „Ĉu vi estas pretaj por la plej grava paŝo de via vivo?”

„Jes, certe,” respondas fianĉo fiere.

„Ni aĉetis dek litrojn da vino, kvin litrojn da ĉampano, kaj mem distilis tri-dek botelojn da ĝino!”

„Ne, ne, juna sinjoro. Por aĉeti venonon vi devas havi recepton de kuracisto. Tute ne sufiĉas montri foton de via bopatrino...”

La komisaro de la polico demandas al novulo: „Ĉu vi scias kio estas mensogo-detektilo?”

„Certe, mi eĉ edziĝis al unu el ili.”

INTERKOMPREENO

„Kara, antaŭ nia geedziĝo vi asertis ke pro amo al mi vi estus preta iri al la rando de la mondo.”

„Jes, bedaŭrinde tiam mi ne faris tion!”

Virino revenas hejmen kaj diras al sia edzo: „Oni ĵus perfortis min en la enirejo!”

„Iru do al la kuirejo kaj manĝu citronon.”

„Ĉu tio helpos min?”

„Ne, sed certe forigos tiun kontentan rideton.”

„Fileto, portu al mi kvin telerojn el la kuirejo.”

„Kiucele, Panjo?”

„Mi volus pri io interparoli kun Paĉjo...”

„La edzino kaj mi estis feliĉaj dum dudek jaroj.”

„Kaj poste?”

„Kaj poste ni renkontiĝis...”

„Hieraŭ mi gajnis cent milojn en la loterio!”

„Kaj kiamaniere reagis via edzino?”

„Ŝi simple mutiĝis pro ĝojo –”

„Vi ja estas bonŝanculo. Tiom da feliĉo samtempe!”



Dum kverelo, edzino ekscite krias al sia edzo: „Estus pli bone se mi edziĝus kun diablo, ol kun vi...”

„Maleble,” rebatas la edzo. „Geedziĝo inter proksimaj parencoj estas malpermesita!”

Edzino kategorie deklaras al sia edzo: „Nu, decidu! Aŭ min, aŭ bieron!”

„Kaj... kiom da biero?”

„KARA, MI KROMLABORAS”

Edzino demandas sian edzon, kiu

pretigas sin antaŭ ol veturi – sola – al kuraĉloko: „Kial vi ne portas la ringon kiun mi donis al vi?”

„Tiun ringon? En tia varmego?”

„Saluton! Kian novaĵon vi havas?”

„Mia edzino konstante malfidelas...”

„Jes, mi scias. Kian novaĵon vi havas?”

„Sinjorino, kial vi volas ekседziniĝi?”

„Nu, vidu, sinjoro juĝisto, mia edzo vivas duoblan vivon – kaj neniu el ili plaĉas al mi.”

Franca gazeto por viroj anoncis konkurson pri la plej bona priskribo de la mateno. La venkinto estis la aŭtoro de ĉi tiu teksto: „Mi ellitiĝas, matenmanĝas, vestiĝas kaj iras hejmen.”

LA INOJ!

„Mia edzino havas malbonegan memorkapablon.”

„Ĉu ŝi ĉion forgesas?” „Ne, ŝi ĉion memoras!”

„Do, ĉu vi decidis reiri al via edzo?”

„Jes. Mi ne povas trankvile rigardi kiel tiu kanajlo vivas nur por sia plezuro.”

„Hieraŭ en la teatro mi vidis vian edzinon. Ŝi tiel ege tuis, ke ĉiuj rigardadis ŝin. Ĉu ŝi malsanas?”

„Ne, ne. Ŝi estas tute sana. Sed ŝi aĉetis novan robon.”

Geedza paro longe kaj forte disputas. Finfine, la edzo cedas: „Bone, ĉio estu laŭ via deziro.”

„Neniukaze! Mi jam ŝanĝis la opinion!”

Jura virino plendas al amikino pri sia fianĉo. „Neniel mi povas alkitimigi lin al ordeco. Ĉiufoje li ŝovas sian monujon en novan lokon!”

„Kaj ĉu via fianĉo scias ĝuste kiom aĝa vi estas?”

„Jes, certe. Parte.”


„Karulo, la kuracisto konsilis al mi vojaĝi pro mia sano. Kien vi preferus iri?”

„Karulino, prefere al alia kuracisto!”

En Parizo estas fama tombejo. Unu el la ŝtonoj tie havas la surskribon: „Ĉi tie kuŝas François Maurau, kies vidvino posedas kafejon sur Montparnasse, malfermita ĉiutage inter la 10a matene kaj la 8a. NikSt

1. N.de la R.: bonvolu legi ‚femin-ist-o-j’, ne ‚fe-min-ist-o-j’.


Ilustraĵo: *The comic English grammar* de Percival Leigh, Londono, 1840.



Krys Ungar kaj Emile Van Damme, du novaj talentoj en la poezia firmamento, prezentas al vi faskon da poemoj pri hodiaŭaj temoj: jen humuraj, jen pensigaj, jen malgajaj. William Auld ne hezitis citi Ungar kaj Van Damme inter la plej elstaraj poetoj nunaj.

*Krys Ungar: Meznokto metropola. 360 BEF + afranko.
Emile Van Damme: Dolçe amare. 240 BEF + afranko*

Mendu la librojn ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, aŭ ĉe via kutima libroservo.



*Kompendio pri lingvistiko, en formo de vortaro kun difinoj.
Nova metodo de gramatika analizado, sur ĉiuj niveloj, konforme al nova teorio.
Nova kvantiga procedo, geometrie prezentbla.
Nova distribuo de lingvistikaj branĉoj kaj konceptoj.
Nova terminografio por lingva geneologio.
Nova nomenklatur, esprimita per nova lingvaĵo: Universala Esperanto.*

Formato A4 - 300 p. - 930 BEF + afranko - Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo.

Esperanto = Interlingvo?

JES!

Ĉar nun ekzistas la


HUNGARA LINGVOKURSO

Enkonduko kaj kurso pri tiu finn-ugra lingvo, kun multaj klarigoj, tekstoj ekzercoj kaj plena vortlisto.

Mendu ĝin ĉe FEL (810 Belgaj frankoj + afranko) aŭ ĉe via kutima libroservo.

Kolektu viajn valorajn ekzemplerojn de MONATO en
praktika plasta kolektilo!

En unu kolektilo vi povas mem facile bindi 12 numerojn.



Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Prezo 360 BEF (inkl. afrankon). Se vi mendas 2 ekzemplerojn, vi ricevos trian senpage!

Kvin miliardoj da homoj en preskaŭ 200 landoj apartigitaj de geografio, lingvo, kulturo, kutimoj, ekonomio kaj politiko. Nokte, ili dormas kaj sonĝas pri pli bona morgaŭo.

Helpi realigi tiun ĉi revon estas nia metio. Mitsui alportas longan historion de sperto kaj atingoj al tiu ĉi defio.


Plej grave, ni alportas riĉan komprenon de la bezonoj, valoroj kaj cirkonstancoj de ĉiu el niaj najbaroj tra la mondo.

Mitsui & Co. laboras por plibonigi la kvaliton de vivo pere de komerco kaj investo, provizante ŝancojn por ke ĉiuj dividu la mondon de morgaŭ.

Levu vin do kaj brilu, jen la aŭroro de nova kaj pli bona tago.

De Kor' al Kor', komunikad' mondwide
Pli ol 170 filioj tra la mondo.
Demandu pri la oficejo en via urbo ĉe:

MITSUI & CO., LTD.
Corporate Communications Division
C.P.O. Box 822, J-100-91 Tokyo



La Revo de morgaŭ

Esperantisto ? Certe ! Kristano ? Eble.
tiam

DIA REGNO

estas **VIA** revuo.

Mendu provokzempleron ĉe Leen Hordijk,
van Hogendorpstraat 4, NL-3135 CD Vlaar-
dingen, Nederlando.

SENNACIULO

Organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
(SAT)

kies membroj kontribuas al kreo
de mondo emancipita, tolerema,
sen-antaŭjuĝa.

Aperas monate.
Petu informojn de:
SAT, 67 av. Gambetta,
F-75020 Paris, Francio.